Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Majo-Junio 2017 | n-ro 05-06 (1343-1344)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Kanzono kontraŭ naciismo

Jen, en mia (tamen senrima) E-a traduko, kanzonteksto vidita ĉe change.org [1], kadre de informo pri la progreso de subskribkolekto kontraŭ Pegida ("Patriotaj eŭropanoj kontraŭ la islamigo de la Okcidento"), grupo, kiu dum iu tempo okazigis grandajn manifestaciojn en Dresdeno kaj aliloke, kaj kies nomo jam diras, kiuspeca ĝi estas, sed kiu nun remalfortiĝas, kun ligilo al kanzono de la berlina kantistino Dota [2], spektebla ĉe Youtube [3].



**Dota**

## Limoj

Kiu estas ene, kiu estas ekstere ?
Mi desegnas linion. Vi ne rajtas trapasi.
Aero renkontas aeron,
Lando renkontas landon.
Haŭto renkontas plumbon.

Kie estas supre, kie sube ?
Kiu povus, kiu volas ŝanĝi tion ?
Kio okazas en la landoj,
ĉe iliaj randoj ?

Estas Frontex kaj homrepuŝoj,
bariloj, armiloj, konferencoj de sindefendo kontraŭ fuĝantoj.
La Mediteraneo iĝas amastombo.
Estas limoj.

Ili kondukas al naciismo kun ĝiaj
stultaj konsekvencoj,
Oni senrajtigas homojn, nur ĉar ili venis de ie.
Estas limoj.

Ĉu vi bonvolus ĝustasence
kompletigi ĉi tiun respondon :
Kio eble kuŝas en la kerno de la problemo ?
Estas limoj.

Mi malregistras min, donu al mi pasporton,
en kiu "terano" estas ekskribita.
Simple nur "terano".
Bonvolu diri al mi, kien iri.
Mi malregistras min, mi transregistras min.
Tiel malfacile ne povas esti.
Simple enskribu tie "terano".

Ni desegnas limon en la ĉielo,
Unu dio estas tie kaj alia tie ĉi.
Tiam ili minacas unu la alian per pugnoj,
eterne kaj tiel plu.

Devas ekzisti io pli bona,
Pacon alportas neniu dia mesaĝisto.
Ni elprovis jam kelkajn jarmilojn limojn,
Rezultis multaj mortintoj.

Nomu min naiva, estas al mi egale,
Sed laŭ mi sufiĉas.
Mi serĉas la landon, en kiu ĉiu ĉiun
egalas laŭ la ŝtatmalaparteneco.

Mi malregistras min, donu al mi pasporton,
en kiu "terano" estas enskribita.
Simple nur "terano".
Bonvolu diri al mi, kien iri
Mi malregistras min, mi transregistras min,
Tiel malfacile ne povas esti.
Simple enskribu tie "terano".

Mi fermas la pordon kaj ĝuas la silenton,
Mi dislimas min, tiel devas esti.
Ĉiu havas sian limon, kiu lin ĉirkaŭas,
Ĝi protekte enfermas lin.

Ĉiu perfortaĵo, ĉiu bato
atencas homan rajton.
Kial oni tiel bone protektas la limojn de la ŝtatoj
Kaj la limojn de la homoj tiel malbone ?

Ili ne devas desegniĝi inter la landoj
Sed inter la homoj.
Ne el pikildratoj ili estu,
Sed el respekto.
Estas limoj.

Videblas, ke la opoziciemo kontraŭ naciismo (kaj la sennaciismo de SAT) ne estas esoteraĵoj, sed esprimoj de tendenco iom post iom pli ĉeesta en la maldekstrularo de la nuntempo.

Gary Mickle

**Notoj**
[1] https://www.change.org/p/1-mio-unterschriften-gegen-pegida-nopegida/u/19123040
[2] https://de.wikipedia.org/wiki/Dota_%28Sängerin%29
[3] https://www.youtube.com/watch?v=MgpoE_2dWhY

# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen denove 36-paĝa numero de Sennaciulo, kiu fakte eĉ povus esti iom pli dika, sen la premo de la tempa malfruo kaj de la limigita laborforto de la redaktantoj.

Ja, reagojn vekis la pasinta numero, kaj eĉ ene de la redaktejo mem. Pluraj skipanoj forte malkonsentas pri idearo evidentiĝanta en pluraj pli fruaj artikoloj, laŭ ilia takso naciisma aŭ diversmaniere homgrupofobia, kaj trovas la menciitajn sintenojn kontraŭdiraj al la spirito de la statuto de SAT. Aliflanke, aliaj opinias, ke redaktantoj devas rezisti la tenton plenumi ideologian filtradon aŭ valoran prijuĝon de la kontribuoj, kaj ke eĉ en kontribuoj taksitaj de iuj neakceptindaj, povas ĉeesti ideoj pripensindaj por aliaj. Ekzemple tiu, ke gravas kompreni la kaŭzon de iu problemo por efike kontraŭbatali ĝiajn postsekvojn. La interŝanĝoj ene de la redaktejo certe produktos materialon por pliaj kontribuoj. Ĉiuj legantoj estas bonvenaj partopreni kaj en la gazeta interŝanĝo, kaj en la redakta laboro.

En tiu ĉi numero vi cetere trovos la agadraporton de la PK kaj la financan bilancon, kiuj estos pridiskutitaj en Seulo.

Agrablan legadon kaj verkadon deziras al vi

La redaktoskipo

Pro biografia projekto pri nia samideano Eduardo Vivancos (Barcelono, 1920) mi bezonas vian helpon. Mi petas al tiuj, kiuj iam konis lin kaj povas havi informojn, bildojn aŭ simplajn memoraĵojn pri li aŭ pri homo/evento, kiu iamaniere rilatas al li (ekzemple la SAT-kongreso de Toronto en 1973), kontakti min rete, poŝte, telefone aŭ eĉ profiti la Seulan kontekston por priparoli la aferon aŭ eventuale transdoni interesan materialon. Antaŭdankon!

Xavi Alcalde

rete: alcalde.javier@gmail.com
telefone: +39 3425887910
poŝte: C/Coll i Vehi 141, 3r 1a, 08026, Barcelona (Hispanio)

**Frontpaĝa bildo:**
Dmitri Bogatov, programisto, instruisto de matematiko ĉe Financa kaj Leĝa Universitato en Moskvo, subtenanto de libera programaro, kontribuanto al Debian- kaj GNU-projektoj, esperantisto, funkciiganto de finnodo de la anonimiga reto Tor, malliberigita ekde la 10-a de aprilo 2017.

# Enhavo


## Sirio
4 Veron kaj justecon por Sirio ! RICHARD SCHNELLER
5 Eksaj anoj de usona sekreta servo pridubas la usonan pravigon por la armea bato en Sirio
6 Ni mobiliziĝu kontraŭ la diktatoraj reĝimoj, la imperiaj agresoj kaj IŜ ! Forpuŝu la sekurecajn, rasismajn kaj rigorecajn politikojn
7 Bombado de Usono al Sirio – Ĉu antaŭludo al nova Irako 2003? ELSON CONCEPCIÓN PÉREZ
8 "Sep punktoj pri la usona atako kontraŭ Sirio SERGIO ALEJANDRO GÓMEZ
10 "Agnoski la kurdan identecon estus la plej grava helpo"
12 Renkontiĝo kun teroristo DIETER ROOKE

## Enmigrado
13 Politika Propagando KANI
14 Per ĉiuj fibroj de valizo SERGEJ VLADIMIROV

## Tra la Mondo
15 Pafi aŭ naski ? ANDREJ ŜVEDOV
16 Poloj – unu el la plej laboremaj popoloj en Eŭropo MIR-KO
18 Osprey falis en Okinavo HORI JASUO

## Intelekta memdefendo
19 Ni restos fidelaj al la promeso sentime publikigi la veron JULIAN ASSANGE

## Sindikatismo tutmonda
20 Madagaskaro: dokistoj estis maldungitaj, ĉar ili aniĝis al sindikato
20 Somalio: Ĉesigu la atakojn kontraŭ la ĵurnalistoj kaj aliaj sindikatanoj
21 Kazaĥio: Ĉesigu la represion, malfermu dialogon kun la laboristoj!
21 Turkio: 14 sindikataj gvidantoj frontas punon je mallibereco

## KoKino
22 La homaj rajtoj estas en danĝero, jam venis tempo por defendi ilin! LEO KONEMAN

## Beletro
2 Kanzono kontraŭ naciismo GARY MICKLE
23 Monaj ĉifonoj (3) ESPOPORE

## SAT-anoj aktivas
24 Konata neesperanta eldonejo publikigis gravan poemaron en dulingva (hispana-esperanta) versio MIGUEL FERNÁNDEZ
25 Esperanto inter la latina kaj la helena SAIOA ESCOBAR
26 8-an de marto: Internacia tago de la virino

## El la SAT-Administrejo
28 89-a SAT-kongreso - Bilanco
29 Pri referendumo por komuna kongreso de UEA kaj SAT PEDRO SANZ
30 Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2016 ĝis Majo 2017
32 BILANCO je la 31a de decembro 2016 BRUNO HENRY
33 SPEZOKONTO – Jaro 2016
33 Raporteto de la kontokontrolistoj
34 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Preseraroj | Donacoj
35 Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 2016-2017
35 Novaj aliĝoj

## Nekrologo
35 NADUDVARI Otto HENRY BRUNO (34987)


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***

# Veron kaj justecon por Sirio !

Tion postulas cento da francaj esploristoj kaj artistoj per alvoko [1]. Ĉiutage aperas novaj atestoj pri la tragedio, kiun vivas la siria popolo fare de la barbara reĝimo de Baŝar al-Asad kun subtenoj rusa kaj irana. Neregistaraj organizoj (Human Rights Watch, Médecins sans frontières, Amnesty International) sciigas pri uzo de kemiaj armiloj kaj bombado de hospitaloj en Alepo. Civiluloj estas bombataj, malsatigataj kaj devigataj fuĝi. Proksimume 12 milionoj da sirianoj estas delokitaj (4,7 milionoj ekzilitaj plejparte en Libano kaj Turkio; 7,6 milionoj ene de Sirio mem). La subskribintoj rekomendas subteni la "mekanismon internacian, senpartian kaj sendependan pri la plej gravaj rompoj de la internacia juro faritaj en Siria Araba Respubliko depost marto 2011", aprobitan de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj.

## Raporto de esplor-komisiono de UNo pri militkrimoj

La Internacia kaj Sendependa Esplorkomisiono pri Sirio prezentis severe akuzan raporton en Ĝenevo (1.3.2017). La 37-paĝa dokumento mandatita de la Konsilio pri Homaj Rajtoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj rezultas el 291 intervjuoj en Sirio kaj Ĝenevo, inter aliaj el tiuj distance de loĝantoj en Alepo [2]. Tiu enketo estis forte malhelpita de la siria reĝimo, kiu rifuzis ĉiun ajn kunlaboron. La akuzoj de la komisiono estas gravaj: uzo de klorbomboj kaj de aliaj malpermesitaj armiloj (grapolbomboj, kontraŭbunkraj bomboj), utiligo de civiluloj kiel homa ŝildo, devigaj delokigoj de loĝantaro, atako kontraŭ sanitara kamionaro de UNo ktp. La raporto konkludas, ke "ĉiuj engaĝitaj partioj en la batalo por Alepo faris gravajn rompojn de la internaciaj humanecaj leĝoj pri militkrimoj". La prezidanto de la komisiono, la brazilano Paulo Sergio Pinheiro, deklaris, ke "estus nerespondece akuzi sen pruvoj; ne temas pri raporto, kiu mencius ĉion, kio okazis dum ĉi tiu periodo, sed pri faktoj specifaj kaj tre gravaj, pri kiuj ni havas precizajn informojn".

## Atako kontraŭ sanitara kamionaro

La enketistoj interalie strebis malkovri la respondecon dum la bombado kontraŭ kamionaro transportanta sanitaran helpon de UNo kaj de la Ruĝa Krescento araba-siria (19.9.2016). Tiu ĉi atako, kiu kaŭzis la morton de 20 personoj, el kiuj 15 sanitaraj helpantoj, kaj detruis 17 kamionojn el 31, provokis indignokrion de la internacia komunumo kaj estis la mortobato al la provo de konsento inter Usono kaj Rusio pri batalhalto. "Ĉiuj raportoj, satelitaj bildoj, atestoj kaj laŭleĝaj ekspertizoj surterenaj pruvas la implikiĝon de siriaj militfortoj", asertas la enketistoj, kiuj akuzas tiujn ĉi, ke ili "militkrimis atakante la kamionaron kaj la helpantojn por bloki sanitaran helpon".



**Paulo Sergio Pinheiro**

## Ribeluloj ankaŭ akuzitaj

La enketistoj respondecigas la ribelulojn pro iliaj kanonadoj de la okcidentaj kvartaloj de la urbo sub registara kontrolo. La komisiono akuzas la ribelulojn, ĉar ili malhelpis la fuĝon de civitanoj kaj konfiskis grandan parton de la sanitara helpo. La fina interkonsento por la evakuado de la lastaj loĝantoj de okcidenta Alepo en decembro 2016 – interkonsentita inter la ribeluloj sub la egido de Rusio kaj Turkio – estas nomata "perforta delokado de loĝantaro kaj konsekvence militkrimo".

## Senpoveco en la Konsilio de Sekureco

Carla Del Ponte – membro de la esplorkomisiono kaj iama prokuroro en la Internacia Pun-Tribunalo por Eksa Jugoslavio kaj por Ruando – rekonis, ke "ni povas enketi, konstati faktojn kaj kolekti pruvojn kontraŭ armeanoj kaj politikistoj, sed ni ne povas akuzi ilin antaŭ internacia puna tribunalo". Ŝi bedaŭras, ke la Konsilio de Sekureco neniam alprenis politikan decidon tiurilate, ĉar ĝi estis blokita pro vetoo-minaco fare de Rusio.

Richard Schneller

*Kompiltraduko el:*

*Stéphane Bussard, Le Temps, Ĝenevo (1.3.2017): http://tinyurl.com/hymvvmj*

*Marc Semo, Le Monde, Parizo (1.3.2017): http://tinyurl.com/jpyxf5e*

**Notoj**

[1] Libération, Parizo (2.3.2017): http://tinyurl.com/hpmag4h

[2] Komuniko de UN Human Rights, Ĝenevo (1.3.2017): http://tinyurl.com/hehra8z

# Eksaj anoj de usona sekreta servo pridubas la usonan pravigon por la armea bato en Sirio

Grupo de du dekoj da eksaj kunlaborantoj de sekreta servo el Usono (*Veteran Intelligence Professionals for Sanity* – VIPS) pridubas en memorando la motivigon de la registaro TRUMP por la armea bato kontraŭ Sirio kaj la usonan version pri la okazaĵo kun veneno-gaso en Idlib (Sirio). En sia memorando [...] ili petas insiste prezidanton TRUMP

– 1. pripensi sian aserton, ke la siria registaro estas kulpa pri la viktimoj pro veneno-gaso en Idlib,

– 2. fini la danĝeran eskaladon de la malakordo en la rilato al Ruslando.

La aŭtoroj rilatigas sin al informantoj el usonaj armeo-rondoj, kiuj laŭdire subtenas esence la supozojn de la ruslanda kaj la siria registaroj koncerne la pason de la okazaĵo kun veneno-gaso je la 4a de Aprilo 2017. Krome, ili avertas eksplicite pri la risko de rekta militara alfrontiĝo kun Ruslando inkluzive la riskon de eskalado ĝis atommilito.

Ili motivas sian averton per vico da eldiroj de ruslandaj membroj de la registaro pri la okazaĵoj dum la pasintaj monatoj, kiuj kaŭzis rapidan detruon de la reciproka rilato de konfido, kaj proponas baldaŭan pintan renkontiĝon de la prezidantoj de ambaŭ ŝtatoj por redukti la malakordojn.

Ili vidas paralelon al 2003, kiam Usono staris antaŭ la atako kontraŭ Irako kaj la grupo VIPS publikigis sian unuan memorandon; tiam ili avertis la usonan prezidanton kontraŭ atako al Irako sen nerefutebla kaŭzo kaj kredo nur al konsilantoj, kiuj deziras klare militon.




## Memorando al prezidanto TRUMP

***de Veteran Intelligence Professionals for Sanity (VIPS)***

### Koncerne Sirion – Ĉu okazis vere atako per ĥemiaj armiloj?

[...]

2. Niaj kontaktuloj en la usona armeo en la ĉirkaŭaĵo de Idlib diras, ke tio ne okazis. Estis nenia siria “atako per ĥemiaj armiloj”. Anstataŭe, siria aviadilo bombardis municio-deponejon de Al-Kaida (arabe القاعدة Al-Qā'ida) Bazo en Sirio, kiu estis plena da malsanigaj ĥemiaĵoj, kaj forta vento blovis ĉi tiun nubon ŝarĝitan ĥemie super proksiman vilaĝon, en kiu mortis multaj pro tio.

[...]

*Andrej HUNKO, membro de la germana partio La Maldekstruloj (germane Die Linken) kaj de la Germana Federacia Parlamento (germane Deutscher Bundestag).*

*Aprilo, 2017*

*Tradukis Andreo J. PENK*

Fonto: http://andrej-hunko.de/start/aktuell/3531-ehemalige-us-geheimdienstler-zweifeln-us-begruendung-fuer-militaerschlag-in-syrien-an

المنشور
المنتدى الاشتراكي
نشرة الكترونية ماركسية ثورية

# Ni mobiliziĝu kontraŭ la diktatoraj reĝimoj, la imperiaj agresoj kaj IŜ ! Forpuŝu la sekurecajn, rasismajn kaj rigorecajn politikojn

La intensigo de la konflikto kondukita de la imperiaj potencoj (Usono, Rusio, Eŭropaj ŝtatoj, ktp.) kaj regionaj (Sauda Arabio, Kataro, Turkio, Irano) en Mezoriento, tiujn pasintajn monatojn, draste tuŝis tiujn regionajn popolojn. Ĝi estas rezulto de pluraj formoj de la kontraŭ-revolucio, reprezentataj de la diktatoraj kaj kontraŭ-revoluciaj reĝimoj kaj de la islamaj reakciaj fortoj kiel IŜ, kunigita kun la volo de la grandaj internaciaj kaj regionaj potencoj, trudi sian politikan kaj ekonomian hegemonion sur la regiono.

En Sirio, la ĉefa formo de la kontraŭ-revolucio manifestiĝas per la subteno al la reĝimo de Al-Assad, ĉu per la murdistaj atakoj kondukitaj de Rusio kaj la interveno de la Islama respubliko de Irano, de la Hezbollah, de la irakaj reakciaj konfesiaj milicoj, ĉu per la malfido de la okcidentaj potencoj al la demokratiaj kaj siriaj revoluciaj fortoj, inkluzive de la kurdaj.

Tiuj fortoj, kiuj luktas favore al demokratia kaj socia alternativo estas la ĉefaj celoj de la reganta siria reĝimo, de la imperiistoj, kaj de ties aliancanoj en la regiono. Ankaŭ la demokratiaj siriaj fortoj estas la celo de la reakciaj islamaj fortoj, iam-tiam subtenataj, rekte aŭ nerekte, de la monarkioj de la Golfo kaj Turkio.

Kaj, kiel kutime, la virinoj estas la ĉefaj viktimoj de tiuj militoj pro, interalie, la multobligo de seks-perfortoj, forkaptoj, kaj eĉ vendoj.

IŜ estas rezulto, unuflanke de la imperiistaj agresoj internaciaj kaj regionaj, aliflanke de la diktatora karaktero, kaj de la konfesia aspekto de la regionaj reĝimoj, ĉefe en Irako kaj Sirio.

La kreskado de la konfesiaj streĉoj en la regiono, estas ankaŭ konsekvenco de la kunigo de tiuj elementoj.

En tiu kunteksto, estas kompreneblaj la atencoj en Ankaro, Bejruto, Parizo, Kuvajto, Sauda Arabio, Tunizio, aŭ la atenco kontraŭ la rusa aviadilo en Egiptio. Inverse, tiuj atencoj nur plifortigas la radikon de la malbono, t.e la Ŝtata terorismo.

La retoriko de la milito kontraŭ terorismo, havas kiel efikon, plifortigon de la sekurecaj, militistaj kaj rasismaj politikoj. Tiu milito, lanĉita de la imperiismaj potencoj, ebligis pravigi pluigon de la diktaturoj, restrikton de la liberecoj, la subpremon kontraŭ ĉia politika aŭ socia opozicio, la kreskadon de rasismo, ĉefe islamofobio.

Aliparte, tio instigas Francion, Rusion, Usonon, Turkion kaj la sirian reĝimon – eĉ, se ĉiu rolulo havas siajn proprajn interesojn kaj motivojn – kunordigi, je rekta aŭ nerekta maniero, iliajn atakojn kaj militistajn manovrojn en Sirio.

Je la nomo de milito « kontraŭ terorismo », kondukita de François Hollande en Sirio kaj Irako, en ties aŭtoritata antaŭfuĝo kaj lia nekapablo provizi politikajn kaj sociajn respondojn al la aspiroj de la popolaj klasoj de Francio, la potenco volas enregimentigi la socion.

Je la nomo de laŭdire « valoroj de Francio », la liberecoj estas atakataj!

En la sama logiko, ekde nun, estas indikataj kiel internaj malamikoj la senlegitimuloj, la islamanoj, la vualitaj virinoj, la romaoj, la eksterlandanoj, ktp.

En la regiono Granda Mezoriento, ni spektas pli da subpremo kontraŭ la politikaj opoziciantoj kaj la sociaj movadoj, kiel ni povas konstati en Egiptio kaj aliloke, kie la morto-kondamnoj okazas por centoj.

La portempa malĉeesto de mobiliziĝo en larĝaj sektoroj de konfuzataj popolaj homamasoj, necesigas plenumon de konsciaj kaj konstruivaj iniciativoj, nome:

– Kontraŭstari la liberdetruajn politikojn, defendi la demokratiajn rajtojn de ĉiuj.

– Kontraŭstari ĉiujn imperiajn agresojn, kaj ĉiujn kontraŭ-revoluciajn kaj diktatorajn ŝtatojn de la regiono.

– Kontraŭstari la okcidentan militistan kampanjon kondukitan en Sirio – kontraŭ la bombadoj, kaj ĉiu alia rekta partopreno de la okcidentaj militistaj fortoj kaj/aŭ la fortoj subtenataj de Okcidento surterene.

– Lukti kontraŭ ĉiuj formoj de la kontraŭ-revolucio.

– Lukti kontraŭ la sekurecaj politikoj subpremaj, rasismaj kaj rigorecaj.

– Lukti kontraŭ « fortresa Eŭropo », por malfermado de la landlimoj, kaj por decaj vivkondiĉoj de la rifuĝintoj kaj migrantoj.

– Plifortigi la solidarecon kun la popolaj homamasoj, kiuj batalas favore al sia liberigo kaj emancipado en Granda Mezoriento kaj en la mondo.

Solidareco kun la demokratiaj kaj progresemaj fortoj kontraŭ-imperiismaj en la araba regiono, kaj ĉie en Granda Mezoriento.

Solidareco kun la popoloj de Maŝreko kaj Magrebo en iliaj legitimaj luktoj por emancipado, kaj kontraŭ ĉiuj fremdaj agresoj: la emancipigo de la popoloj de la regiono estos verko de tiuj popoloj mem.

*Manifesto subskribita de longa listo de politikaj organizoj.*

Fonto: http://al-manshour.org/node/7128

# Bombado de Usono al Sirio – Ĉu antaŭludo al nova Irako 2003 ?


Nikki Haley

La scenara muntado pri la supozata uzo de ĥemiaj armiloj fare de la siria armeo kontraŭ la teroristoj, kiuj okupas parton de la araba nacio, estis ellaborita de Usono per la sama platformo uzita en marto 2003 de la tiama prezidanto George W. Bush por pravigi siajn bombadojn kaj ekokupon de Irako.

Nun, Donald Trump faris la unuan paŝon kaj ordonis lanĉi 59 raketojn al aerarmea bazo en la provinco de Homs, kio mortigis proksimume dekon da homoj en evidenta spito al la internacia komunumo kiu, pri kelkaj aferoj eĉ kredis liajn antaŭelektajn paroladojn, en kiuj li diris, ke li ne eniĝos en tiajn militojn.

Kiam antaŭ 14 jaroj Bush, sen konsulti la UN, komencis la bombadon de Irako, li diris al la mondo, ke tiu araba nacio disponas pri amasdetruaj armiloj kaj monatojn poste devis koncedi ke tio estis mensogo, ke ĝi estis eraro de la usonaj sekretaj servoj. Sed la malbonaĵo estis farita kaj hodiaŭ oni scias, ke pro tiu agreso mortis aŭ kripliĝis miliono da irakanoj.

Irako estis transformita en veran ĥaoson, kaj vere malracie la sanktejoj, heredaĵo de la homaro, urboj plenaj de historio kaj de kulturo estis ruinigitaj kaj hodiaŭ estas pafkampoj inter militaj grupoj aŭ rifuĝejo de tiuj, kiuj volas konstrui terorisman kalifujon.

Sed la usona pretendo alproprigi al si la irakan petrolon plenumiĝis, dum nuntempe civitanoj, precipe infanoj, mortas ĉar tuŝitaj de malriĉigita uranio entenata en dekoj da miloj de bomboj ĵetitaj de usonaj aviadiloj kaj de la NATO en urboj kiel Faluĵa kaj aliaj.

La uzado de tiuj armiloj malpermesataj de la internaciaj konvencioj neniam estis kondamnita de Vaŝingtono, dum tiu kulpigas Sirion, sen ajna pruvo, esti uzinta ĥemiajn armilojn kontraŭ la terorismo.

Tamen la nuna prezidanto de Usono asertis, ke “ne estas duboj, ke Sirio uzis malpermesatajn ĥemiajn armilojn”.

En tiu ĉi kunteksto ne eblas pretervidi, ke Trump agis kiel instrumento de la militmaŝino, de la ekonomiaj kaj politikaj interesoj kaj de potenca komunikila sistemo je lia servo. La milita komplekso bezonas militojn por ke la mono fluu kaj ke la dolaro restu la monetalono sur la internacia scenejo.

La argumento, kiun Nikki Haley, usona ambasadorino ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, uzis, ne povas esti pli aroganta, kiam ŝi diris: “Kiam la UN ripete malsukcesas en sia devo agi kolektive, kelkfoje ni, la ŝtatoj, vidas nin devigataj fari nian propran agon”.

Ĉi-foje, dum la Unuiĝintaj Nacioj estis denove ignorataj de Vaŝingtono, en Eŭropo, Francujo, Britujo, Germanujo, Hispanujo kaj la registaroj de aliaj landoj de la NATO urĝis montri sian apogon al la milita atako kontraŭ Sirio.

Kaj valorus la peno demandi, ĉu la nova ĉefo de la Blanka Domo kaj la tiel nomataj eŭropaj “aliancanoj” ne scias, ke Sirio eliminis ĉiujn ĥemiajn armilojn en 2014, en agado superrigardata de la internacia institucio taskita pri kontrolado de tiaj armiloj.

Aŭ la momento elektita de Vaŝingtono rilatas kun la antaŭen-



Fernando Moragón

marŝo de la siriaj armitaj fortoj kaj kun la apogo de la rusaj aviadiloj, kiuj estas venkantaj la Islaman Ŝtaton kaj la Fronton Al-Nusra.

Precize tion Vaŝingtono ne volas, ĉar temas pri la apogo de la siria popolo al ĝia registaro kaj al ĝia armeo.

Trump kaj liaj militaj falkoj forgesas la milionojn da sirianoj, kiuj devis forlasi sian landon pro la teroristaj atakoj. Aŭ ili ne kalkulas la proksimume 300.000 sirianojn mortintajn en tiu trudita konflikto.

Kio povas pravigi, ke sur Sirion lanĉiĝas 59 raketoj, krom deturni la atenton por apogi la armitajn grupojn kiuj agas kontraŭ la registaro de Al Assad.

En Irako en 2003 okazis io sama. Oni komencis per granda mensogo kaj lanĉis la militon de okupado. Oni faligis la registaron kaj mortigis ĝian prezidanton. Oni okupis la landon kaj detruis ĉiajn registarajn infrastrukturojn kaj multon da ĝia universala heredaĵo.

Ankaŭ Libio estis kaptita de simile krima politiko. Vaŝingtono kaj la NATO same atakis ĝin. Ĝia prezidanto estis sovaĝe murdita. Oni faris tiun nacion neregebla teritorio, kiu daŭre ne rekonas sin mem.

Kiam oni parolas pri ĥemiaj armiloj, Vaŝingtono ŝajnas forgesi la malpermesatajn armilojn, kiun ĝiaj militistoj uzis en Irako, en la eksa Jugoslavujo, en Afganujo, en Vjetnamujo, inter aliaj.

Tiu ĉi bombado kontraŭ Sirio okazas, dum Ruslando faras ĉiajn eblajn diplomatiajn klopodojn por sidigi ĉirkaŭ la tablon de interparoladoj ĉiujn faktorojn, kiuj partoprenas en la siria konflikto.

Pri la interparoladoj, kiuj pli ol unu fojon fiaskis en Ĝenevo, la fakulo pri geopolitko kaj prezidanto de la Hispana-Rusa Observejo de Eŭrazio, Fernando Moragón, diris, ke oni devas konsideri, ke la opozicio estas opozicio de pupoj; ĉar ĝi dependas de tiuj, kiuj financas ĝin kaj, lastinstance, de Usono. Ili estas pli aŭ malpli brutalaj ĝihadistaj grupoj apogataj de diversaj eksteraj agantoj.

Kaj ĝuste nun, kiam plej mankas dialogo inter la sirianoj por trovi eliron el la konflikto, aperas 59 raketoj lanĉitaj de Usono, barbara ago kiu povas aktivigi danĝeran sparkon meze de pulvujo.

Persone mi pensas, ke la debato pri tio en la Konsilantaro pri Sekureco de la UN, krom konfirmi la apogon de la brita, germana, franca kaj hispana registaroj kaj de la NATO kaj de Israelo al la usona atako, denove montris, ke la Unuiĝinta Naciaro, nekapabla kondamni la agresantojn, ne faris pli ol la supre menciitan alvokon al "moderiĝo" kaj al serĉado de politika solvo.

Nun necesas alarmi la internacian komunumon pri la danĝero, ke la okazaĵo en Sirio povas esti la antaŭludo de tio, kion Usono kaj la NATO faris kontraŭ Irako, uzante la samajn mensogojn kaj similajn armilojn.

Elson Concepción Pérez

*Elhispanigita de Vilhelmo Lutermano el "Granma" de la 10-a de aprilo 2017, p. 5*

Granma

# Sep punktoj pri la usona atako kontraŭ Sirio

**La akrigo de la perforto de Usono en la siria konflikto, per lanĉo de duoncento da raketoj kontraŭ aerarmea bazo de la registaro de Damasko, levas multajn demandojn pri la motivoj malantaŭ tiu ago kaj pri la eblaj konsekvencoj por eksplodema regiono kiel Mezoriento. Granma komunikas al siaj legantoj sep punktojn, kiuj ebligas meti la ĵusajn okazaĵojn en la kunteksten.**


## 1. Ne ekzistas pruvoj ke Sirio uzis ĥemiajn armilojn.

En la nokto de ĵaŭdo, la 6-a de aprilo, 59 krozraketoj kun longa atingo (Tomahawk) estis lanĉitaj de militŝipoj en Mediteraneo kontraŭ la aerarmea bazo de Ŝajrat, en Homs. Vaŝingtono konsideras, ke de tie ekflugis la aviadiloj, kiuj pafis sarino-gason kontraŭ civila loĝantaro en la vilaĝo



**António Guterres**

Jan Ŝijún, kie mortis proksimume 80 homoj, inter ili 11 infanoj. La bombado "estas vivnecesa por la interesoj de nacia sekureco de Usono, same kiel por antaŭmalhelpi kaj malebligi la uzadon kaj la disvastigon de mortigaj ĥemiaj armiloj", diris la prezidanto Donald Trump en nacia parolado. Tamen, la internaciaj instancoj antaŭ tri jaroj certigis, ke la siria registaro ne posedas ĥemiajn armilojn post ilia malmuntado kun rusa helpo. Krome, la esplorado, kiu surloke okazas fare de la Organizaĵo pri Malpermeso de Ĥemiaj Armiloj en Ŝijun ankoraŭ ne faris sian taksaĵon. La siriaj instancoj, apogataj de Ruslando, neas la usonan version de uzado de ĥemiaj armiloj kaj asertas, ke la situacio estiĝis post bombado al armilejo de la teroristoj, kiu entenis tiun specon de armiloj.



Dmitri Peskov

## 2. La atako de Trump eble rompis la leĝojn de Usono.

La atako de ĵaŭdo estas la unua de Usono kontraŭ instalaĵoj de la siria registaro post kiam la civila konflikto en tiu lando komenciĝis antaŭ pli ol ses jaroj. Ĝis nun, la internacia koalicio gvidata de Usono limigis sin ataki supozatajn celojn de la Islama Ŝtato kaj malrekte subteni armitajn grupojn. La okazaĵoj de ĵaŭdo konsidereblas kiel militdeklaro. Laŭ raporto de CNN, la demokrata senatano Tim Kaine, membro de la komisionoj pri Armitaj Servoj kaj pri Eksteraj Rilatoj, eldonis komunikaĵon, en kiu li asertas, ke la prezidanto Donald Trump "lanĉis militan atakon kontraŭ Sirio sen voĉdono de la Kongreso". Kaine memorigis ke tiu, laŭ la konstitucio, estas la laŭleĝa organo kiu devas deklari militon. En la jaro 2013, antaŭ simila scenaro, la tiama prezidanto Barack Obama konsultis en la Kongreso pri la ebleco komenci la militon kaj ne ricevis apogon.

## 3. La Blanka Domo troviĝas sub internaj premoj.

Por multaj observantoj la atako kontraŭ Sirio montras ŝanĝon de la pozicio de Trump, kiu dum la elektokampanjo montriĝis kontraŭa al pli granda enmiksiĝo de Vaŝingtono en la internaciajn konfliktojn. Ankaŭ kiam oni ankoraŭ ne pensis pri lia aspiro kandidati por la prezidantelektoj, en la jaro 2013, la nuna prezidanto esprimis sin kontraŭ ebla milito en Sirio. "Obama devas komenci koncentriĝi en niaj lando, laboro, sano kaj ĉiuj niaj multaj problemoj", li skribis tiam en la socia reto Twitter. "Li forgesu Sirion kaj faru Usonon denove granda!"

## 4. Ĝi estas unuflanka ago, kiu endanĝerigas la internaciajn klopodojn.

Laŭ komento de Dmitri Peskov, proparolanto de la rusa prezidanto Vladimir Putin, la atako kreos "seriozajn malhelpojn al la starigo de internacia koalicio por batali kontraŭ la terorismo". Tiel, dum urĝa kunveno de la Konsilantaro pri Sekureco, la reprezentanto de Ruslando, Vladimir Safronkov, avertis Vaŝingtonon, ke la intencoj trudi ultimaton al Damasko ne funkcios. Li aldonis, ke "la mondo fariĝis pli kompleksa kaj multpolusa kaj jam ne eblas vivi tiel". La ĝenerala sekretario de la UN, Antonio Guterres, siaflanke alvokis al prudento. "Konscia pri la risko de laŭŝtupa akriĝo, mi alvokas al memkontrolo por eviti ian ajn agon kiu povus profundigi la suferon de la siria popolo", li diris.

## 5. Ruslando decidis ĉesigi sian kunlaboradon kun Usono en Sirio.

La usona unuflanka ago endanĝerigas la delikatan ekvilibron atingitan surloke inter la diversaj potencoj kaj agantoj, kiuj intervenas en la siria konflikto. Deklaro de la rusa ministrejo pri eksteraj rilatoj indikis, ke oni suspendas la interkonsenton pri aera sekureco kun Usono, "formulitan por certigi, ke la aviadiloj de la du landoj ne koliziu en la aero". La rusaj trupoj, kiuj kunlaboras en la batalo kontraŭ la terorismo, disponas pri altteĥnikaj ekipaĵoj por kontraŭaviadila defendo, kiuj povas depafi la plej modernajn okcidentajn ĉasaviadilojn, kio altigas la streĉiĝojn.

## 6. Damasko konsideras la atakon rompo de ĝia suvereneco.

La registaro de Sirio en la UN denuncis la "barbaran agon de agreso", kiun faris Usono, kaj petis ke oni faru disponojn "por ke tio ne ripetiĝu", raportas EFE.

## 7. Kiu plej gajnas per la incidento estas la teroristoj mem.

La atako krome okazas en momentoj, en kiuj la siriaj trupoj, apogataj de Moskvo, akiras gravajn venkojn kontraŭ la teroristoj, kaj samtempe internaciaj klopodoj kunordiĝas por trovi intertraktitan eliron el la civila konflikto. Tiel la akriĝo estas vidata de multaj kiel instigo por la ekstremistoj ĝuste kiam ili estas premataj, spite al la supozata intereso de la usonanoj elimini la teroristan minacon. "Se Sirio kolapsas, ĝi povus transformiĝi en rifuĝejon por la islamaj teroristoj, precize la situacio, kiun Trump volas eviti", skribis David Sanger, la ĵurnalisto de *The New York Times*.

Sergio Alejandro Gómez
*9a aprilo 2017*
*GRANMA, 2017-04-08*
*(Elhispanigis* Vilhelmo Lutermano*, 2017-04-08)*
*Fonto: http://mas-eo.org/spip.php?article614*

# “Agnoski la kurdan identecon estus la plej grava helpo”

*Sozar Derik. Membro de la Milita Konsilantaro de la PPT-IPT(1)*

**Nuntempe la kurdaj milicoj defendas la ĉirkaŭaĵon de Minbiĝo (2). Sozar Derik estas la regiona respondeculo. Ŝi rimarkigas, ke pli ol aplaŭdon pro ĝia rezistado, Roĵavo bezonas veran helpon.**


La bataloj ĉirkaŭ Mosulo (Irako), Alepo (Sirio) kaj Rakaho (3) (Sirio) estas nun la kruda spegulaĵo de la milita situacio en Mezoriento kaj ili klare montras, ke la Islama Ŝtato perdis la iniciaton en tiu zono. El la unua frontlinio de Roĵavo, Sozar Derik respondis al intervjuo de Berria meze de novembro (*). Ŝi membras en la Milita Konsilantaro de la PPT-IPT. Nuntempe, la kurdaj milicoj pretiĝadas por defendi Minbiĝon.



**Sozar Derik**

**Ĉu ci resumus al ni, kia estas la milita situacio en la regiono?**

Ni vivas kruelan militon kaj ekzemplomontre estas rezistantaj, de Rabiao (4) ĝis la Ŝengala Montaro (5). Ni komencis la “Operacon Martiro Rubar Qamishlo” por malfermi koridoron ĝis Girespio (6) kaj tiel kunigi la kantonojn de Ĝiziro (7) kaj Kobano. Ni povas aserti, ke ni atingis gravajn venkojn, kaj la civitanaro volonte kaj aŭdace nin subtenadas. La PPT-IPT estis la avangardo en tiuj avancoj. Ni batalas koalicie en la SDF (8), kaj ni akiris grandajn venkojn en la nordo de Sirio. Ĝis nun la IŜ ne havis iun ajn eblecon venki en iu el la frontoj ĉe kiuj ni agadis; male, ni ĝin





atakas, kie ajn ni ĝin trovas.

**Ci estas la milita respondeculo en la regiono de Minbiĝo.**

Ĝuste. Minbiĝo estis urbo konkerita de la IŜ kaj ni atakis dum kelkaj semajnoj por ĝin liberigi. Estis tagoj de krudaj bataloj. La Islama Ŝtato batalis ĝis la fino. Ĝis la lasta homo kaj la lasta kuglo, kaj ĝi uzis siajn plej bonajn trupunuojn kaj armilojn. Fine ni ĝin venkis. Tamen la ĉiutaga vivo ne normaliĝis kaj ĝi ankoraŭ estas riska. Ŝajna kaj fragila estas la trankvileco, sed ni povas diri, ke niaj taĉmentoj pretas alfronti iun ajn neantaŭviditaĵon. Sed ĝenerale, ni kontrolas diversajn zonojn de la siria teritorio.

**Ĉu tro multaj interesoj interkruciĝas en la konflikto?**

Sen la intenco aroganti mi povas diri, ke ni estas la nura forto, kiu de la komenco batalis kontraŭ IŜ, kaj ne nur en Sirio. Nun, oni povas diri, ke la tuta mondo estas implikita en tiu ĉi milito. Kelkaj agas laŭ siaj interesoj, kelkaj kunlaboras, kaj estas kelkaj, kiuj malamikas inter si. Multaj volas ion gajni en tiu ĉi tohuvabohuo kaj ne volas, ke iu ajn nacio atingu siajn fundamentajn rajtojn kaj liberecon. Kiam mi parolas pri “nacio” mi referencas al kurdoj, araboj, armenoj kaj turkmenoj.

**Ci diris, ke vi aliance batalas kune kun arabaj fortoj. Kiuj estas via politiko kaj la bazoj de via alianco?**

Tiu ĉi ne estas nur milita konflikto, ĝi estas ankaŭ politika milito. Kelkaj fortoj senĉese klopodas forkaŝi niajn progresojn. Kurdoj kaj araboj kune bataladas en la nordo de Sirio kontraŭ IŜ kaj la Fronto de la Venko (9), tamen iuj najbaraj ŝtatoj ilin malamikas kaj ne rigardas kompleze niajn atingojn kaj venkojn. Ni ne volas iun ajn konflikton, nek kun la najbaraj ŝtatoj nek kun la popoloj kiuj vivas en tiuj ŝtatoj, tio estas: turkoj kaj araboj. Ni volas havi bonajn rilatojn kun niaj najbaroj, ni volas vivi pace kun ili. Ne estas nia intenco okupacii la teritoriojn de aliaj. La Islama Ŝtato estas nia malamiko. Kontraŭ ĝi ni batalas kaj ni daŭre batalos ĝis forviŝi ĝin kaj ĝian minacon. Ni kredas je la kunvivado inter popoloj kaj ties libereco kaj laŭ tiuj principoj ni batalas. Ni kredas, ke per la komuna batalado plifirmiĝas la frateco inter la komunumoj kaj nacioj, kiuj vivas en tiu ĉi tero.

**Laŭ tio, kion publikigis kelkaj komunikiloj, vi ricevas helpon de Usono kaj Francio. Ĉu ci dirus ion pri tio?**

Ĝuste, dum la lasta jaro ni laboris kune kun la fortoj de la koalicio en nia lukto kontraŭ la IŜ. Ili precipe respondecas pri la aeratakoj kaj, se ili tion petas, ni ankaŭ laboras kune surtere. Ni ĉiam diris, ke ni kunlaborus kun ĉiuj fortoj, kiuj agas kontraŭ IŜ. Klare estas, ke nia agadkampo estas surterene batali. En tiu ĉi okazo plej gravas la rilatoj kun la popolo, kaj ni bone konas kaj la terenon kaj la vivmanieron de la loĝantaro. La koalicio estas fortika kaj bone konas la elaere farendan taskon. Jen kion mi povas diri pri tio ĉi.

**Ĉu oni povas diri, ke la IŜ suferis militan katastrofon kaj ke ĝi perdis la iniciaton?**

Sendube oni povas diri, ke la fortoj, kiujn ni havas en Sirio, donis al ĝi la plej severajn batojn. Kune kun la arabaj taĉmentoj de la SDF ni venkis



en la jenaj bataloj: Derika Hemko (10), Tilhemiso (11), Tilbirako 12), Ŝedado (13), Girespio, Suluko (14), Bozano (15) kaj fine Manbiĝo. Ni memoru, ke de 2013-a ĝis 2014-a oni asertis, ke ni ne povos batali kontraŭ ĝi nek ĝin venki. Tiam ni ne havis tiel modernan armilaron kiel ili, ankaŭ nenies helpon.

**Roĵavo bone montras, ke licas impulsi alian kunvivadon inter komunumoj. Kion vi lernis el viaj politika kaj milita spertoj?**

Du aferoj klare videblas pere de nia rezistado. Unue, niaj fortoj estis la solaj kiuj vere batalis kontraŭ IŜ, ĝis tiun ĉi elpeli longe for de nia teritorio. Por la IŜ temis pri amara malvenko, sed, por la homoj kiuj scias batali decideme kaj kunlabore temis pri gravega venko. Pasintece, pro la politiko de la damaska reĝimo, estis multaj problemoj inter la loĝantoj de tiu ĉi teritorio, sed, envere, niaj nacioj kunvivis dum jarcentoj. Aliflanke, el socia kaj politika vidpunktoj, en Roĵavo ni malfermis vojon por elektebleco de malsamaj vivmaniero kaj kun-organizado, kie la homoj faras sian la koncepto pri demokratio, rilate la vivon kaj iun ajn decidon. Kompreneble, oni ne povas nei, ke ankoraŭ estas problemoj.

**En via okazo, sendube, la ĉefroleco de la virinoj estas identeca karakterizaĵo, eĉ pli modela komparante ĝin kun la tradicia pensmaniero de la regiono.**

La demokrataj rilatoj koncernas al ambaŭ seksoj. Komencante de tiu ĉi paradigmo do, ne estas mirindaĵo la partoprenado de la inoj en Roĵavo. La kurdaj virinoj ĉiam havis gravan rolon en la politika, socia kaj kultura sferoj. Povas esti, ke la revolucio en Roĵavo faris pli vidindaj la virinojn. Iel ajn, post jarcentoj de sklaveco, Roĵavo fariĝis la simbolo de la libereco de ni, virinoj. Same konfirmiĝas, ke la virinoj kapablas plenumi gravan rolon en iu ajn fako, ankaŭ tiam, kiam alfront-endas kruela malamiko tia, kia la IŜ. Tiu ĉi plej perforte batalis kontraŭ la inoj. La junulinoj batalantaj en Kurdio ĉiutage konfirmas, ke ili ne volas submetiĝi antaŭ ĝia brutaleco. La inoj estas parto de la vivo kaj kulturo de ĉiu nacio.

Pri tio konscias ni, la inoj kiuj membras en la IPT, kaj ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ne konscias pri tio, per la kunvivado inter gemilicanoj ricevas informon pri siaj rajtoj kaj libereco. Dum la historio de la kurdoj la virinoj ankaŭ decidis, kaj neniam ni estis apartigitaj disde la viroj, kiel eble okazis je aliaj multaj luktoj. Laŭ mia opinio, dum la revolucio en Roĵavo unuafoje la inoj havis tiom da ĉefroleco. Por ni, la libereco de la inoj estas ligita al vivo demokrata, libera, ekologia kaj egaleca.

**La internacia alvoko por la rekonstruado de Kobano apenaŭ alportis materian rezulton en la realo.**

En la rezistado kontraŭ la Islama Ŝtato, Kobano estiĝis simbolo por la tuta mondo. En tiu senkompata lukto mortis centoj de niaj gejunuloj, kaj aliaj miloj estis vunditaj. Envere, ili ne povis agi pli heroe kaj sinofere. La tuta mondo estis atestanto pri tiu volontega forto, malgraŭ tio la urbon oni preskaŭ komplete detruis same kiel la ĉirkaŭajn vilaĝojn, kiuj donas vivon al la urbo. La ĝihadistoj delokigis preskaŭ 60.000 homojn kaj ties domojn forrabis. Respondante al cia demando, post la liberigo de Kobano oni ofertis al la urbo materian helpon vere magran.

**Utiligante la rajton, kiun donas ĉiutage riski cian vivon kontraŭ la IŜ, kiun mesaĝon ci adresus al la mondo, por ke la politika solidareco alportu konkretajn farojn?**

Ĉiuj loĝantoj de Roĵavo, ne nur tiuj de Kobano, alfrontas enormajn problemojn, politikajn kaj ekonomiajn, kaj ŝajnas, ke ili havas ĉiujn vojojn baritaj. Tio estas hontinda por la mondo. Ĉiuj loĝantoj de Roĵavo – kurdoj, araboj, armenoj, turkmenoj kaj kaŭkazianoj – malriĉas kaj bezonas urĝan helpon kaj, mi ripetas, nenian helpon ili ricevis. Multaj vortoj, sed envere malabunda konkreta helpo.

Ni faros nian devon por defendi tiun ĉi teron, sed ni petas al la mondo, ke ĝi helpu al niaj homoj refari siajn vivojn. Al la infanoj, inoj kaj mal-junuloj, kiuj perdis siajn familianojn defendante tiun ĉi komunumon. Ni daŭrigas la lukton, sed la homoj tie ĉi vivantaj bezonas vian helpon por ree komenci sian normalan vivon.

Kaj, samtempe, ni bezonas politikan helpon cele atingi statuson por Roĵavo. Fakte, kiu ajn homarana helpo por la popolo de Roĵavo kunportas agnoskon de nia ekzisto, tiun de la kurdoj kaj tiun de la aliaj nacioj, kiuj kunvivas kun ni. De ni kurdoj oni forprenis ĉiujn niajn rajtojn, agnoski nian identecon do estus la plej grava helpo.

**Notoj** (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):

(1) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel) – Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê).

(2) Minbic. Manbij, en la araba.

(3) al-Raqqah, en la araba.

(4) al-Rabiaa, en la araba.

(5) Ŝengalo estas tradicie la loĝregiono de la jazidoj en Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê, la kurda teritorio ene de la Iraka Ŝtato.

(6) Girê Spî. Tell Abyad, en la araba.

(7) Cizîr.

(8) Siriaj Demokrataj Fortoj (SDF)/Hêzên Sûriya Demokratîk (HSD).

(9) Jabhat al-Nusra, en la araba.

(10) Dêrika Hemko.

(11) Til Hemîs.

(12) Til Birak.

(13) Sheddadê.

(14) Suluk, en la araba.

(15) Bozanê. Ayn Issa, en la araba.

**Klarigoj**:

(*) Intervjuo de Jose Miguel Arrugaeta kaj Orsola Casagrande originale aperinta en la eŭska ĵurnalo Berria la 26-an de Novembro 2016-a.

*Tradukis: NXC. Decembro 2016-a.*
*Provlegis: DS.*

# Renkontiĝo kun teroristo

Okaze de kampanjo por nia komunista partio (la Partio de Laboro de Svisio — PdA), mi estis komisiita disdoni agitmaterialon por balotoj al la urba parlamento de Berno. Nia ĉela sekretario sciigis al mi adreson de maneĝo (ĉevalrajda lernejo), kulturcentro de alternativuloj apud ĉefa stacidomo, kie okazis kunveno organizita de obskura asocio: “Kontraŭrasisma Perspektivo”. La 18-an de novembro 2016, je la 20-a horo komenciĝis la kunveno en granda halo de la kulturcentro. Aperis studento el Berno kiu deklaris ke lia gasto komunikos en la angla. Simpatia junulo ĉirkaŭ 30-jara rakontis pri sia vivo en Sirio, en urbo Alepo.

Unue li pace manifestaciis kun aliaj gejunuloj sur stratoj — sed post reprezalioj li aliĝis al armita grupo kaj prenis pafilon en siaj manoj. Kiam intensiĝis la milito en la urbo, necesis zorgi la viktimojn. Senkulpuloj, infanoj mortis pro bombardo. Tial li aliĝis al la Blank-Kaskuloj (organizaĵo kies pretendata rolo estas savi vivojn de senkulpaj viktimoj de milito, sed ĉiam apud ĵurnalistoj kun fotiloj aŭ kameraoj) [*].

La filmo montris ŝokajn scenojn, sed la skribitaj komentoj estis anglalingvaj — kaj por mi tial suspektindaj, ĉar la Blank-Kaskuloj ĉe la ekrano parolis ekskluzive en la araba lingvo. Tre klare estis videblaj la manipuladoj. En Jutubo nuntempe estas videbla pardonpeto pro la sceno kun la savo de “manekeno”. La simpatia junulo malkaŝe propagandis por la teroristoj — ĉar ja inter liaj amikoj estas batalantoj kontraŭ la Siria armeo.

Kiom da malamikoj li mem murdis, tion li evidente ne rakontis.

Mi demandis la svisan organizanton en la germana, ĉar mi ne regas la anglan: “Kial vi ne telefonas al viaj amikoj en urbo Alepo por ĉesigi la hombuĉadon?” Li klare respondis: “Ni ne cedos, ni oferos niajn vivojn”.

Dum sinsekva posta kunveno de nia komunista ĉelo mi raportis pri mia travivaĵo. Ĝi levis ardan disputon. Kamaradino obĵetis: “La situacio estas tiom komplika, kaj ne komprenebla por ni eksteruloj”. Sed por mi estas tute klara: kondamninda estas terorismo, eĉ se tion propagandas simpatia junulo. Mi legis en gazeto svisa: la teroristoj eĉ petis helpon de dio!

Dieter Rooke *(14-dec-2016)*

*Fonto: http://www.ikek.org/artikoloj-renkontigxo_kun_teroristo_2016_12_14*




**Renkontu la blank-kaskulojn: propaganda bildo desegnita por fortigi la Usonan politikon de « reĝim-ŝanĝo » en Sirio**

**Noto**

[*] La Blank-Kaskuloj estis kreita de Britio kaj Usono en 2013. La manaĝero estas John Le Mesurier, entreprenisto kaj antaŭa brita soldato. Ĝi funkcias en la ribel-regataj teritorioj de Sirio, ĉefe kun la politikaj islamistoj de Jabat al-Nusra — t.e. Al-Kaida en Sirio — subtenata de Britio kaj Usono. La ĉefa funkcio de la Blank-Kaskuloj estas propaganda. Ĝi demonigas la sekularan reĝimon de Assad kaj instigas imperiisman “humanecan” militan intervenon por trudi reĝim-ŝanĝon en Sirio.

# Politika propagando

Kiam mi komencis legi la lastan Sennaciulo-n, mi gapis. Mi supozas, ke ankaŭ multaj legantoj koleris, ĉar la enhavo de la reago de sinjoro Krob kongruas nek kun esperantismo nek kun la spirito de SAT. Ja por unu kaj por la alia ĉiuj homoj estas egalaj. Ankaŭ en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ŝajne sinjoro Krob klare distingas homojn naskiĝintajn en sia tero kaj parolantajn sian lingvon disde homoj kiuj malas. Sennaciulo estas la organo de sennacieca asocio, sed tiu menciita distingo baziĝas klare sur nacia (eĉ naciisma) sinteno.

Tamen mi ne koleris, mi klopodis elpensi klarigon pri la sinteno de nia samasociano. Li akceptis sendispute la propagandon de naciismaj sektoroj kiuj intencas ruze disvastigi timon al eksterlandanoj kun la ekskuzo ke ili estas islamanoj. Tio ne estas nova. Hitlero bazigis siajn proponojn sur la malamo al judoj kiuj komplotis malicege. La usonaj registaroj bazigis sur same mensogaj apogo al terorismo aux ekzisto de amasdetruaj armiloj la invadojn kaj postan ruinigon de Irako. Ĉu vere iu vidis komencon de islamigado de Eŭropo? Ĉu sinjoro Krob jam devis iri kontraŭvole al la moskeo? Aŭ lia najbaro? Se venas miloj, milionoj da islamanoj aŭ alireligianoj al Eŭropo kaj praktikas ties religiojn aŭ kutimojn, tio ne estas danĝero esence.

Eble la reakciaj sektoroj vidas danĝeron en tio ke jam ne plu ĉiuj devas esti egalaj: blankulo, kristana, parolanta la amatan lingvon, obeema ktp. Tie estas la danĝero. Kaj ili volas agiti la flagon de la paniko, por atingi povon. Tio ne estas nova. La historio de Eŭropo -kaj ĉefe de kelkaj landoj, inter kiuj la menciitaj Hungario kaj Ĉeĥio kaj mia propra Hispanio- estis konstruita pere de militoj, amasbuĉado, neniigado de la diferenculoj ktp. Finfine oni atingis la nunan staton, en kiu estas granda homogeneco en kelkaj landoj. Ĉu vere tio estas konservinda? Perforta homogeneco.

Se multaj islamanoj venas al Eŭropo, kaj eĉ oni imagu malverŝajnan hipotezon de islama majoritato, ankaŭ tio ne estas danĝero, se oni konservas la du ĉefajn ilojn de la moderna socio: demokratio kaj libero. Ĉu sinjoro Krob forgesas ke estis, estas kaj povas esti demokrataj islamaj landoj, kaj eĉ en Eŭropo mem demokrataj reĝimoj de islamecaj popoloj. Vere ankaŭ estas kaj estis diktatoraj, perfortemaj islamaj landoj, same kiel kristanaj aŭ nereligiaj. Demokratio ne sufiĉas, ĉar per simpla voĉdonado povas veni al povo diktatora reĝimo. La nepra ilo estas libero. Se la demokrataj eŭropaj reĝimoj fiksigas sufiĉe la religian, pensan, parolan liberojn, ne gravus eĉ se venos islama majoritato. Kio cetere malverŝajnas. Do, kie estas la danĝero?

Multaj rifuĝintoj ne fuĝas el milito. Kial tiu "junaj, muskolaj viroj [...] ne restas hejme"? Do, ili simple fuĝas el malriĉo. Tio estas, ili serĉas pli bonajn vivkondiĉojn. Ĉu tio estas danĝero? Ĉiuj popoloj en la historio migris okaze de neceso. Ankaŭ ĉeĥoj, hungaroj, hispanoj. Kial aliaj popoloj ne faru same nun? Same kiel por libero, simple la ricevantaj landoj, devas havi sistemojn por sekurigi minimumajn vivkondiĉojn por ĉiuj, kaj lokanoj kaj novalvenintoj. Ni ne rigardu ĉu mi estas malriĉa, sed al la riĉo kiun riĉeguloj ne deziras kunhavi kun la popoloj.

Novalvenantoj, bonvenon! Kaj se ni ne havos sufiĉan manĝon, ni serĉu kie ili estas.

Kani 35 501

# Per ĉiuj fibroj de valizo

Ĉiusemajne loĝantaro de la lando malgrandiĝas je kvanto de loĝantaro de malgranda urbo – tia, kia estas Jaunjelgava aŭ Skrunda. Tian ĉi deklaron en radio Baltkom faris profesoro de Latvia universitato, akademiano-demografiisto Peteris Zvidrinŝ.

La tendenco certe ne estas nova. Tamen tio elvokas timon. Tiu fenomeno aperis kune kun proklamo de la sendependeco en la jaro 1991. Komenciĝinta de tiu ĉi momento la loĝantaro de Latvio ĉiujare malgrandiĝas je 23 mil homoj, pri kio en eminentaj koloroj rakontadis la profesoro de Latvia universitato, akademiano Peteris Zvidrinŝ.


## Pri ĉio kulpas la emigracio

“Dum la jaroj de la sendependeco ni perdis 700 mil homojn. Estis la tempo, kiam loĝantaro de Latvio atingis 2 700 000 homojn, kaj de Riga – preskaŭ 1 milionon. Sed hodiaŭ realeco estas tia, ke ni dum ĉiuj 2 semajnoj perdas malgrandan urbon. Kiel, ekzemple, Skrunda aŭ Jaunjelgava. Tio egalas al 58 homoj tage, aŭ 1650 homoj monate” – substrekis la profesoro.

Laŭ vortoj de P. Zvidrinŝ, la kvanto de loĝantoj de Latvio malmultiĝas pro kelkaj kaŭzoj.

“En tiuj ciferoj eniras ankaŭ emigracio kaj mortokvanto. Sed malgraŭ tio, ke supro de emigracio jam pasis, 70% de la Latvia loĝantaro forveturas – serĉante pli bonan vivon”– notis li. Kaj li aldonis, ke estas tre malmultaj homoj, kiuj revenas en Latvion. “Je 10 forveturintoj ni havas nur 2 revenintojn” – finis P. Zvidrinŝ.

Laŭ la esplorado de Latvia universitato, publikigita en la komenco de la nuna jaro, 62,7% de tiuj, kiuj forveturis el Latvio, deklaris, ke ili ne volas reveni, ĉar ili disreviĝis pri Latvio kiel ŝtato. El tiuj, kiuj tamen elektis Latvion kaj revenis, 40% ŝanĝis siajn decidojn kaj denove forveturis, mense.



Peteris Zvidrinŝ

## Mense jam ne tie ĉi

La samon konfirmas demografiisto Ilmārs Mežs. Laŭ lia opinio, okazas amasa rifuzo de Baltiaj loĝantoj je siaj landoj. Nomi tiun ĉi fenomenon “forveturo por perlaboro” estas supraĵo de hipokriteco – opinias la eksperto. “La emigracio nun formas vivmanieron de la Latvia socio. La tuta vivo tiel aŭ aliel turniĝas ĉirkaŭ depopulacio. Gelernantoj interparolas, kiu kaj kien veturos, kiam atingos plenaĝecon, maljunuloj interparolas, en kiuj landoj laboras iliaj infanoj, kion ili tie perlaboras kompare kun aliaj landoj de Eŭropo” – notis li.

Antaŭe Centra Statistika Oficejo informis: en plej granda parto de la Latvia teritorio, precipe en ĉe-limaj provincoj, la kvanto de loĝantoj daŭras malgrandiĝi – plej rapide en Latgalio. Samtempe, laŭ donitaĵoj de departemento pri aferoj de civitaneco kaj migrado de Latvia Respubliko, en la jaro 2016 Riga fariĝis la unusola urbo, en kiu estis fiksita la kresko de la loĝantaro. Kaj laŭ donitaĵoj de Eurostat, dum 25 jaroj loĝantaro de Latvio malgrandiĝis de 2,5 milionoj ĝis 1,9 milionoj de homoj. Se la loĝantaro daŭros malgrandiĝi kun la nuna rapideco, tiam en la jaro 2040 en nia lando restos malpli ol 1,5 milionoj de loĝantoj.

Sergej Vladimirov
*Publikigita en la gazeto* Segodnja *la 15-an de marto 2017*
*Tradukis el la rusa* Andris Natinŝ



# Pafi aŭ naski ?

Sen superflua bruo, tamen regule dum ĉiuj lastaj jaroj kreskas salajroj kaj premioj en *sejmo* (parlamento) kaj registaro, en kancelarioj kaj ŝtataj agentejoj. Tion ĉi neeblas diri pri kresko de enspezoj de kuracistoj kaj sanitaristinoj.

Tiel vivi (kaj, konforme, kuraci) ne estas eble, deklaris la homoj en blankaj medicinistaj vestoj. Tial ili minacis ekstriki. Al tiu iniciato de akuŝejo de Riga kaj de malsanulejo je la nomo de Stradinŝ dum pasintaj libertagoj (25 kaj 26 de februaro) aliĝis Infana Klinika Universitata Malsanulejo. Kiu estos la sekva?

Responde la medicinistoj ricevis nur malklaran murmuradon. Oni staras en sia *sejmo* kaj registaro, de unu kruro al la alia balanciĝas, en okulojn ne rigardas – verŝajne poenton "2" ricevis, aŭ ricevis vican premion.

Mono por medicinistoj mankas, nenio bona estas por diri. Ĝentile sendi for, kiel kutime, maleblas: la medicinistoj por siaj postuloj bonan tempon trovis – antaŭ la elektoj. Se ne nun disdoni antaŭelektajn promesojn, do kiam?

Krome ja, se ie pliigi, tiam ie malmultiĝos. De kiuj forpreni financadon, por helpi al medicinistoj? Fajrobrigadistoj vivas per pano kaj akvo. Instruistoj ĝis nun ne povas la propran reformon fari komprenebla kaj plenumebla. Malriĉe vivas ankaŭ policistoj – se ili ne havus epoletojn, ili povus ekiri laŭ strika vojo de medicinistoj.

Cetere, estas sfero, por kiu oni monon ne ŝparas. Ĉe ni en la nuna jaro aperis ĉirkaŭ 200 usonaj memmovaj haŭbizoj kaj britaj raŭpaj kiraso-transportiloj; ĉio ĉi tio estis aĉetita ĝuste per 300 milionoj da eŭroj, kiuj ne sufiĉas por latvia sanprotektado. Pluse por tiu milita tekniko necesas prepari ĉirkaŭ 1000 tankistojn kaj artileriistojn kaj liveradi al ili ĉiun bezonatan provizon. Al iu necesas doni rangon de generalo – por ke li gvidu la kirasotankan movadon.

Eble la ministerio de defendo dividos la financadon kun la ministerio de sano? Tio estus bele: preni la monon, donitan al kanonoj por senigo de la vivo, kaj doni tiun monon al tiuj, kiuj donacas la vivon.

Sed ne, neatendeblas. Diagnozo al medicino jam estas farita, recepto estas skribita: fermi kuracadajn instituciojn. Profito estas duobla: kaj milionoj por la milita tekniko troviĝos, kaj skandalistoj en blankaj vestoj restos malpli multaj.

Nu, kaj akuŝistinoj povas rekrutiĝi je pafistoj-direktistoj. Pafi en Latvio evidentiĝis pli profita okupo, ol helpo al naskantinoj.

*Andrej Ŝvedov, ĉefredaktoro de la gazeto Segodnja*
*27-an de februaro 2017*
*Tradukis el la rusa Andris Natinŝ*



Sejmo

# Poloj – unu el la plej laboremaj popoloj en Eŭropo

## La labortago de poloj plilongiĝas

Pollando, ŝtato de Mezeŭropo (bildo 1) kun 38,5 milionoj da loĝantoj apartenas al la landoj, kie oni laboras ĉiam pli multe. En la jaro 2015 la polaj laboristoj laboris meze 43,6 horojn semajne, kio signifas preskaŭ la maksimuman kvanton en Eŭropo (post Grekio kaj Ruslando) kaj eĉ en la mondo. La plimulto da poloj povas opinii la ok-horan labortagon nur kiel teorion.

Praktike, la tri kvaronoj da polaj laboristoj devas plilongigi la norman kvardek-horan laborsemajnon je kelko aŭ iufoje dekkelko da horoj. La plilongigo de labortago kutime formiĝas per kromlaboro, kiu estas la kvanto de tempo kiun laboristo laboras preter normala labortempo. La rekrutiga firmao Hays Poland faris en la jaro 2015 esplorojn de la pola laboremo, kiuj estas daŭre prezentataj.

## La specifeco de la laboro en la polaj firmaoj

La efektiveco kaj la kulturo de la laboro en Pollando malfaciligas la strebadon al finfaro de la produktivaj ĉiutagaj taskoj. En la polaj firmaoj estas kutimo, ke la laboristoj ofte petas portempan forpermeson kaj eksterlaborejo reguligas nepre bezonatajn proprajn aferojn. La ofta foresto de la laboristoj devigas ilin al la longigo de la labortempo por realigi la postulatajn taskojn. Multe da devoj kaj rapida ritmo de laboro kaŭzas la ĝeneralan nefinfaradon de la laboristaj tagotaskoj. La lastatempaj ŝanĝoj de la pola labormerkato, karakterizita de la deficito de profesiuloj kaj fakuloj en multaj specialigitaj branĉoj kaj sektoroj, devigas plilongan laboron de la restintaj laboristoj. Tio ankaŭ rilatas al la manko de dungitoj en la komerco kaj la servobranĉo. Oni konstatis neĝustan fakton, ke parto de la polaj firmaoj, ekz. bankoj kaj financaj entreprenoj, havas la kromhorojn kiel elementon de sia laburorganizado.

La esploroj dokumentis, ke kromhore laboras multaj grupoj de dungitoj:

– plentempaj laboristoj, laborantaj ok-hore tage,

– duontempaj laboristoj, laborantaj kvar-hore tage (iufoje: partotempe),

– sendependaj unuopaj entreprenistoj (rekte laborigataj de dunganto),

– studentoj, partotempe laborantaj krom studantaj.


La bildo 2 montras, ke 74% da plentempaj kaj duontempaj laboristoj konstante laboras kromhore, preskaŭ la saman kvanton laboras sendependaj unuopaj entreprenistoj, kaj nur 42% da studentoj.





**Bildo 1**
**Mapo de Pollando**


## La motivoj de longdaŭra laboro

La supernorman labortempon de dungitoj simpligas la praktikataj reguloj de elasta (fleksebla) laboro (interŝanĝeblaj tagaj laborhoroj) kaj eksterlaboreja okupiĝo (ekz. hejma laboro). Ĉi tiuj laborsimpligoj devus faciligi la tiel nomatan "laboran-vivan ekvilibron" (angle: work – life balance),




**Bildo 2**
**La procentoj de kromhoraj laboristoj, depende de sia laboriga stato**




**Bildo 3**
**La procentoj de laboristoj, ricevantaj kromhorajn salajrojn**

**Bildo 4**
**La procentoj de laboristoj, laborantaj ĉiusemajne de 1 ĝis 25 kromhorojn**

tio estas, la ekvilibron inter la homa laboro kaj la privata vivo. Sed praktike, ili kreas nur iluzion de normotempa laboro, ĉar flekseblaj laboristoj kaj hejmolaboristoj ofte la tutan tagon okupiĝas pri sia laboro, respondante al demandoj vespere, nokte, dimanĉe aŭ festotage. Tia situacio kamuflas la kromhorojn, ĉar modernaj teknologioj malhelpas difini kiam ni laboras kaj kiam ni ripozas. Dume, la labora-viva ekvilibro permesas al labordonantoj kaj laboristoj propravole utiligi siajn vitalecojn por vivi ekvilibre kaj egalanime. Ofte firmaaj gvidkadruloj laboras laŭ nenormigita labortempo, kio signifas, ke iliaj ĉiutagaj kromhoroj ne estas pagataj kaj ili ne ricevas libertempon pro kromhora laboro.

La esploroj dokumentas (bildo 3), ke 22% da polaj laboristoj ricevas laborkodan salajron pro kromhora laboro, 24% ricevas libertempon interŝanĝe al la kromhora laboro kaj 54% ne ricevas monon nek libertempon. Pli ol duono de la polaj laboristoj kunprenas hejmen nefinfaritan laboraĵon, kaj preskaŭ la sama kvanto kompletigas la nefaritan laboron sabate kaj dimanĉe. Ĉirkaŭ 35% de la dungitoj laboras 3-5 kromhorojn ĉiusemajne, 24% laboras 10-15 kromhorojn kaj 6% eĉ 20-25 kromhorojn (vidu la bildon 4).

La procento de kromhoraj laboristoj grandiĝas depende de ilia laborservo en la firmao kaj la inklinado al la kromhora laboro estas plej granda por la laboristoj kun pli ol 10-jara laborservo. La bildo 5 montras, ke 87% de la kromhoraj laboristoj havas pli ol 10-jara laborservo kaj nur 53% havas 4-7-jaran laborservon.

## Eksterregula labortempo en firmaoj

La laborinspektoroj de la polaj firmaoj kontrolis 1 400 firmaojn kaj konstatis multajn malrespektojn de dungantoj kontraŭ ŝtataj labortempaj reguloj. La ĉefaj malrespektoj en la jaro 2015 rilatis al la fakto, ke la procento de dungantoj, kiuj:

– ne fiksis la firmaan sistemon de labortempo, laborhoraroj, tempospacaj bilancoj de laboro – estis 51,4%,


– ne determinis la ĝustan rekompencon pro kromhora laboro – estis 31%,

– ne sekurigis la 11-horan diurnan ripozperiodon por laboristoj – estis 21%.

## Konkludoj

La polaj laboristoj apartenas al la plej laboremaj dungitoj tutmonde. Eĉ 75% de la laboristoj plilongigas la 40-horan laborsemajnon je supernormaj horoj. Ĉiusemajne 24% de la laboristoj havas 10-15 kromhorojn.

MIR-KO
*Fonto: Gazetaraj informaĵoj*




**Bildo 5**
**La procentoj de kromhoraj laboristoj, depende de ilia laborstaĝo**

# *Osprey* falis en Okinavo

*Osprey* (foto) estas origine nomo de rabobirdo, sed nun ĝia nomo estas pli bone konata kiel speciala usona milita aviadilo.

*Osprey* havas specialan kapablon vertikale ekflugi kiel helikoptero kaj poste flugi rapidege kaj longe kiel ordinara aviadilo. Tamen estas malfacile manipuli tiujn du sistemojn kaj tiel ofte okazis akcidento, ke oni moke diras, ke ĝi estas produktanto de vidvino. En la sudan insulon Okinavo en Japanio la usona armeo enkondukis tiujn aviadilojn kaj ĉiutage trejnas sin. Do multaj homoj timis/as eventualajn akcidentojn.

Vespere la 13an de decembro usona MV22 *Osprey* falis sur la marbordon de la urbo Nago, Okinavo (foto). Estas domoj 600 metrojn fore, do sekundojn poste ĝi estus trafinta ilin. La pilotoj eskapis el la falanta aviadilo kaj estis savitaj. Kontraŭ la protesto de la gubernio Okinavo la komandanto Nicolson fiere diris: "La pilotoj lerte stiris la aviadilon por ke ĝi ne falu sur tiujn domojn. Ili estas herooj. Iliaj agoj estas dankindaj, do ili devus esti honorigitaj". La japana registaro esprimis tiun kraŝon kiel "krizokaza alteriĝo" por ŝajnigi la akcidenton ne grava, sed fakte la aviadilo rompiĝis en pecojn kaj tute ne plu uzeblas.

Laŭ la klarigo de Usono la akcidento okazis, dum oni provizis ĝin per fuelo de alia aviadilo, kaj la hoso trafis ĝian helicon. Tio malstabiligis ĝin kaj faligis ĝin. Usono insistas, ke la aviadilo mem ne havas ian malordon, sed nur pro malbona manipulado en ventoj la akcidento okazis.

Pri tiu akcidento kaj la maldeca eldiro de la komandanto, la ĉefministro neniam postulis de li pardonpeton, kaj simple diris, ke li postulis detalan esploron pri la akcidento. Sed surprize, nur post 6 tagoj Usono komencis flugigi *Osprey*-ojn, kaj la japana registaro esprimis komprenon pri tio, dirante, "Laŭ la informoj donitaj de Usono kaj esploroj faritaj de la ministerio de nacia defendo kaj la defendkorpuso, rekomenciĝo de la aviadiltrejnado estas akceptebla". La guberniestro Onaga forte protestis kontraŭ Usono kaj la japana registaro, dirante, ke la timo pri *Osprey*-oj tute ne estas forviŝita kaj la japana registaro tute perdis sendependecon sub la milita pakto inter la du landoj.

Nun la registaro konstruas du novajn militbazojn por Usono en Okinavo: unu estas militbazo Henoko en la maro de la urbo Nago kaj la alia estas helikopter-alterigejoj de Takae. Se tiu militbazo Henoko estos konstruita, al ĝi povos veni 100 *Osprey*-oj kaj la plej modernaj militŝipoj, tiele Okinavo estos preskaŭ eterne militbazo de Usono. Se la helkopter-alterigejo estos konstruitaj, al ĝi flugos *Osprey*-oj, kies bruegoj ne permesos al la loĝantoj trankvilan vivon.

Por sukcesigi la konstruadojn, la registaro mobilizas 500 policanojn el la tuta Japanio kaj subpremas la kontraŭmovadon. Japanio estas ŝajne sendependa lando, sed en efektiveco kolonio de Usono. Japanio ne havas rajton mem esplori la usonajn



akcidentojn, ne povas protesti kontraŭ Usono, neglektas plendojn de la loĝantoj, kiuj suferas/os pro danĝero kaj bruego de *Osprey*.

Tamen tiu movo de la registaro rilatas ne nur al Okinavo, sed al ĉiuj homoj en aliaj gubernioj, ĉar la registaro jam mendis 5 *Osprey*-ojn por la japana defendkorpuso. En mia gubernio troviĝas militbazo de la defendkorpuso kaj oni planas fari trejnadon de *Osprey* tie, kaj nia urbestro aprobis tion.

La nuna registaro pli fortigas la militan ligon kun Usono. Por kunlabori kun ĝi, Japanio jam pretigis la leĝaron por tio. Kiam la nova prezidanto Trump postulos sendon de japanaj korpusanoj al militoj de Usono, ĉu Japanio povos rifuzi la postulon?

HORI Jasuo

*La 20an de decembro 2016*






# Ni restos fidelaj al la promeso sentime publikigi la veron

Karaj amikoj de la *Reto de Intelektuloj, Artistoj kaj Sociaj Movadoj por la Homaro* kunsidantaj en Karakaso:

En la libro *Proverboj* aperas, ke "domo konstruiĝas kun saĝo kaj fortiĝas per la prudento. Ĝiaj ĉambroj pleniĝas de belegaj trezoroj per la konoj." Sed estas io pli en tio.

La sekvanta verso estas "La saĝuloj estas pli povaj ol la fortuloj". La kono estas povo.

Mi havas la grandan honoron alparoli vin en ĉi tiu datreveno de la morto de homo, kiu vaste kaj kuraĝe batalis kontraŭ la imperiismo, la novkoloniismo kaj aliaj formoj de premado de la popoloj ĉefe en Latinameriko.

Chávez havis la plej gravan rolon en la tutmonda spaco per siaj senlimaj klopodoj evoluigi la regionan integriĝon kaj kunlaboradon kaj konstrui plurpolusan mondon.

Li denuncis la maljustaĵojn kiel li vidis ilin kaj en 2001 li estis la sola gvidanto, kiu denuncis la murdojn de senkulpaj civitanoj en Afganujo faritajn de Usono; li diris: "Vi ne povas alfronti la terorismon per terorismo". Post 6 monatoj Usono apogis puĉon kontraŭ li, sed tiu puĉo estis fuŝita, kiam centmiloj da venezuelanoj surstratiĝis; multaj el ili havis en la manoj la konstitucion.

Kiel ni ĉiuj, li ne estis senkulpa, sed liaj virtoj skuis la teron.

Kiel direktoro de *Wikileaks* mi publikigis la sekretojn de la povuloj kaj krome ni konstruis malsaman kaj povan bibliotekon, kiu enhavas la informojn pri la envera funkciado de nia mondo kaj ties institucioj; ĝi enhavas informojn, kiuj dum jarcentoj estis en la manoj nur de la elitoj kaj nun – ĉe riskoj kaj persekutado – ni diskonigis kaj disponigis ĝin al la popolo sen distingo pro politiko aŭ kredo.

La informoj disponeblas por ĉiuj, por ke la socio de la tuta mondo malfermu la okulojn kaj kun nerefuteblaj datumoj en la mano alfrontu la povulojn kaj eltiru siajn proprajn konkludojn, sen gazetaraj filtriloj, pri la eventoj kaj politikaj decidoj, kiuj efikas al iliaj vivoj.

La celo de *Wikileaks* – serĉi la veron nome de la homaro – estas hodiaŭ pli grava ol iam; tiun celon ni plu serĉas malgraŭ la alta prezo de ni pagita pro tio.

La kosto, en mia kazo, estis alta. Mi estis jure persekutata kaj malliberigita dum preskaŭ sep jaroj, sen akuzoj kontraŭ mi. La persekutado okazis ankaŭ kontraŭ mia familio, miaj gefiloj, kiujn dum tiu tempo mi ne povis vidi.

La Unuiĝintaj Nacioj (UN), pluraj organizaĵoj pri homaj rajtoj kaj mondaj elstaruloj alvokis Svedujon kaj Britujon respekti siajn internaciajn devojn, por ke ili respektu kaj agnosku la suverenecon de Ekvadoro kaj do agnosku mian azilon kaj ne plu baru ĉi tiun homan rajton. Estas nekredeble, ke la imperiisma sinteno de Britujo kaj Svedujo, jam en la 21-a jarcento, permesas al ili senpune malagnoski suverenan agon de sendependa lando, Ekvadoro.

Mi memorigas la ĉeestantojn, ke Ekvadoro pagis kaj plu pagas altan prezon pro mia azilo por protekti min kontraŭ la politika persekutado, ĉar mi diskonigis la sekretojn de la imperio. La ekvadora ambasadejo en Londono estis atakminacata de la brita polico kaj ĝis hodiaŭ ĝi estas submetita al neniel komparebla kaŝobservado.

Malakcepti la permesilon, kiu rajtigas min vojaĝi al Latinameriko, estas ago entute imperiisma fare de landoj okupantaj altrangajn postenojn en la UN kaj tamen ne volantaj agnoski kaj permesi la aplikon de universala rajto; tion ili faras kun kompleta senpuneco, primokante krome la suverenecon de lando de la sudo kaj de la tuta latinamerika regiono, kiu unuanime apogis mian azilon; tiu ago estas grava malrespekto al la digno de niaj popoloj kaj al la sistemo de la UN. Dum jaroj fari



**Julian Assange**

tion pruvas la rompiĝon kaj grandan retroiron de la internacia sistemo de homrajta protektado por ĉiuj.

Por eĉ ne paroli pri mia lando, Aŭstralio, kiu estas plia servutulo de la imperiismaj interesoj; kiu en sep jaroj eĉ ne unu fojon apogis min kaj kiu krome klopodas krimkulpigi min, por ke mi ne povu reveni hejmen. Malgraŭ firma rezolucio fare de la plej altnivela aŭtoritato rilate arbitrajn arestojn – kiu post detale analizi mian kazon decidis, ke mia aresto estis arbitra kaj neleĝa kaj ke estas devo tuj liberigi min kaj doni al mi kompenson – kaj Svedujo kaj Britujo entute malakceptas ĝin.

Malgraŭ ĉio, la imperio ne povis silentigi min. Mi estas libera simple, ĉar mi estas libera esprimi min. Mi ĝuas ĉi tiun liberecon danke al la kuraĝo de Ekvadoro kaj aliaj landoj, inter ili Venezuelo, kiuj kuniĝis por apogi min. Mia batalo povas fariĝi sukcesa historio por la esprimlibereco kaj la homaj rajtoj.

La provizo de pluveturpermeso do estos justeca kaj digna ago por la regiono.

Ni restas fidelaj je la promeso sentime kaj sen maskitaj inter-

konsentoj publikigi la veron. Ni plu strebos plenumi nian devon koncerne la veron kaj la socian justecon.

La liberiĝo de niaj popoloj dependas de la mensliberiĝo de la popoloj. Por tio ni bezonas, ke pacaj revoluciaj klopodoj, kiel tiu de *Wikileaks*, elfloru en la tuta mondo. Pro tio ni bezonas haltigi la persekutadon kontraŭ *WikiLeaks* kaj ĝiaj homoj.

Tion ni kune faru hodiaŭ. Morgaŭ eble estos tro malfrue.

JULIAN ASSANGE
*La 6-an de marto 2017*
*Elhispanigita de Norberto Díaz Guevara*

Fonto: http://mas-eo.org/spip.php?article612

Komento de Vilhelmo Lutermano: “Diri tion, kio estas, restas la plej revolucia ago.” (Rozo Luksemburgo)

## Somalio : Ĉesigu la atakojn kontraŭ la ĵurnalistoj kaj aliaj sindikatanoj




Dum la kvar lastaj jaroj, la federala registaro de Somalio atakis la Nacian Unuiĝon de la somaliaj ĵurnalistoj (NUSOJ) kaj la Federacion de la somaliaj sindikatoj (FESTU), ĉar tiuj sindikatoj rifuzas la kontrolon de la registaro. Tiu ĉi malpermesis la sindikatajn kunsidojn de NUSOJ en Mogadiŝo, altrudis ne-sindikatanojn, kiel estrojn de FESTU kaj NUSOJ, timigis la sindikatajn gvidantojn kaj sindikatanojn, inkluzive pere de arestadoj kaj vojaĝlimigo. La registrado de la statutoj de la sindikatoj estis rifuzitaj kun la celo konservi al ili kontraŭleĝan staton. La plej altrangaj juĝistoj estis maldungitaj, ĉar ili prenis decidon favoran al la sindikato en 2016. FESTU ne rajtas reprezenti la laboristojn dum la tripartaj intertraktadoj.

La Ĉefkortumo de Somalio kaj la IOL internaciskale agnoskis la reprezentecon de NUSOJ kaj FESTU, ankaŭ la registaro devas agnoski ilin, kaj ĉesigi la represion kontraŭ tiuj sindikatoj.

*Informo el LabourStart*
*https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3439*

## Madagaskaro : dokistoj estis maldungitaj, ĉar ili aniĝis al sindikato

La madagaskaraj dokistoj luktas por siaj rajtoj. Ili estis maldungitaj, ĉar ili aniĝis al sindikato por lukti kontraŭ malstabila laboro, danĝeraj laborkondiĉoj, kaj malaltaj salajroj. En marto, sindikatoj el la tuta mondo sendis leterojn al la madagaskara konsulejo, petante justecon por tiuj laboristoj, kaj ilian reenpostenigon. Centoj da aliaj homoj transmetis la retmesaĝon rekte al la registaro de Madagaskaro, admonante ĝin respekti siajn lokajn leĝojn pri la laboro, kaj defendi la rajtojn de la laboristoj. La 3an de aprilo 2017, la ITF [1], la SCI [2] kaj la sindikato de la laboristoj SYGMMA [3], deponis plendon ĉe la OIT [4] en la nomo de la 43 dokistoj.


Subtenu la madagaskarajn dokistojn kaj sendu retmesaĝon al la Ministrejo de la Laboro por instigi ĝin apliki la lokajn leĝojn pri la laboro, kaj reenpostenigi tiujn laboristojn.




*Informo el LabourStart*
*https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3426*

Notoj
[1] Internacia Federacio de Transportlaboristoj.
[2] Internacia Konfederacio de Sindikatoj.
[3] Ĝenerala Mara Sindikato de Madagaskaro.
[4] Internacia Labor-Organizo.

## Kazaĥio : Ĉesigu la represion, malfermu dialogon kun la laboristoj !

Antaŭnelonge, la kazaĥa registaro lanĉis grandskalan subpremadon kontraŭ la gvidantoj kaj aktivuloj de la sendependaj sindikatoj en la regiono Mangistau, okcidente de la lando. En januaro, la lokaj funkciuloj kaj la kadroj de la direkcio de la OCC, giganto de petrolservoj, provis subpremi pacan, amasan protestadon de la laboristoj. La prezidento de la sindikato de la laboristoj de la OCC, Amin Jeleusinov, kaj laborinspektisto, Nurbek Kuŝakbajev, estis arestitaj la 20an de januaro. Pli poste, la 7an de aprilo, persekutata surbaze de la punkodo alprenita en 2014, Kuŝakbajev estis kondamnita de la tribunalo de Astana pro siaj alvokoj al striko, je du jaroj kaj duono en disciplina laborcentro. La juĝisto kondamnis lin ankaŭ al monkompenso de 25 milionoj da tengoj (80 000 usonaj dolaroj) pro supozata damaĝo.

Samtempe, la direkcio de la OCC starigis punojn kontraŭ la dungitoj, kiuj partoprenis al la manifestacioj. La OCC estas filio de KazMunaiGas, la plej granda publika petrol- kaj gas-kompanio en Kazaĥio. Ni bezonas vian helpon por malhelpi la subpremadon kontraŭ la sindikataj aktivuloj. Ni postulu de la direkcio de KazMunaiGas, nuligon de la monkompensoj, haltigon de la subpremado, kaj malfermon de dialogo kun la laboristoj.

*Informo el LabourStart*
*https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3412*

## Turkio : 14 sindikataj gvidantoj frontas punon je mallibereco




Dek kvar gvidantoj kaj membroj de la Ankara branĉo de la turka sindikato TÜMTİS frontas punon je mallibereco, pro akuzoj bazitaj sur politikaj motivoj datiĝantaj de la jaro 2007. Ni postulas ilian senkondiĉan malliberigon.

La 14 viroj estis inter la 17 personoj, kaptitaj en frumatena surprizatako en 2007 post plendo de loĝistik-firmao, en kiu TÜMTİS ĵus finaranĝis sukcesan organizadon.

Nekredeble, spite al internaciaj protestoj, okulfrapaj senkonsekvencoj kaj neregulaĵoj, ili estis kondamnitaj en 2012 al malliberejo pro la mirigaj krimoj de "fondo de organizaĵo, kun la celo plenumi krimon kontraŭ paca laboro pere de devigo, por akiri nejustan mongajnon, kaj malhelpi ĝuadon de sindikataj rajtoj".

La kondamnoj kaj la proceso malobservadis la internacian juron. TÜMTİS kaj ITF apelaciis, sed malgraŭ la pruvoj de ekscesoj dum la proceso, la apelacia kortumo konfirmis la punojn.

*Informo el LabourStart*
*https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3366*




# La homaj rajtoj estas en danĝero, jam venis tempo por defendi ilin!

Dekkvin jaroj! Ni festas hodiaŭ la 15an datrevenon de la Internacia Filmfestivalo kaj Forumo pri Homaj Rajtoj [1], kiun mi fondis en 2003 en Ĝenevo, ellaborante koncepton de duobla klopodo, samtempe artan kaj politikan, kiu pruvis sian ĝustecon kaj kiu daŭre aplikiĝas.

Kombinante la 7an arton kaj debatadon dum 15 jaroj, la FIFDH donas la parolon al tiuj, kiuj konkrete luktas surterene por la respekto de la homa digno kaj por ke ni estu informitaj, sentigitaj kaj mobilizitaj. Ni diskonigis la relativismon, kiu subfosas la noblecon de la universalaj valoroj. Respektindaj politikistoj tamen falis en la kaptilon de la realecpolitiko. Venis la tempo, por ke ili rekonsciiĝu kaj prioritatigu la fundamentajn rajtojn anstataŭ priplorinde akcepti ŝtatajn raciojn, kiuj estas la morto de universalismo kaj venko de la naciismo plej primitiva.

Nuntempe ni alfrontas ĝeneralan malpliiĝon de la humaneca sentemo kaj regreson de demokratioj. Senpove oni ĉeestas tutmondajn aliigojn kaj oni vidas pli kaj pli ofte aŭtoritatecajn ŝtatestrojn ĉekape de landoj, kvankam demokratiaj. Kiel skribis Kenneth Roth la 12an de januaro 2017: “La altiĝo de popolismo danĝere minacas la homajn rajtojn... Diversaj politikistoj klopodas akiri la povon en Eŭropo, vokante al rasismo, al ksenofobio, kontraŭ enmigrado kaj al mizogineco.”

En angoriga politika kunteksto la forto de niaj valoroj multjarcentaj erodiĝis komence de la 21a jarcento kaj la konsekvencoj speguliĝas en la ĉiutaga aktualeco. Fino de iluzioj! Kvankam la faŝismo estis venkita en la 20a jarcento, ĝi povas tamen renaskiĝi el la cindroj kaj, kontraŭe al tio, kion oni kredis, “la historio ne balbutas, ĝi ripetiĝas”. Gerniko aktualiĝas kun la bombadoj de Alepo fare de la siria kaj rusia armeoj, kiuj daŭrigas laŭ Amnestio Internacia “la ekstermadan politikon” fare de la siria reĝimo komencitan en 2011. La internacia komunumo sciis tion, sed ne povis malhelpi ĉi tiujn krimojn.

Hodiaŭ la elreviĝo! Anstataŭ direkti sin al celo, pri kiu oni kredis konsenti, instaliĝis en pluraj landoj aŭtoritateca ŝtato kun ŝajnigo de demokratio, la tiel nomataj “demokraturoj”. La Rusio de Putin estas perfekta ekzemplo: liberecoj estas toleritaj, sed sub la arbitro de fervora polica tiranio en la servo de despota ŝtato. En Ĉinio floranta ekonomio kapitalisma instaliĝis sub la alta kontrolo de la ununura partio ĉiam same subprema. Kaj ĉefe, iuj landoj, kiujn oni kredis ligitaj al demokratiaj valoroj, ŝanĝis la direkton: en Turkio, diversa kaj laikeca, nuntempe sub la potenculo Erdoğan, instaliĝis diktaturo kun integrisma haladzo; naciismaj partioj pligraviĝas en eŭropaj landoj.

Ĉi tiu malkresko de niaj demokratiaj valoroj estas des pli grava, ĉar akcelita en la interno de intelektuloj kaj politikistoj, kiuj subtenas ĉi tiujn atakojn kontraŭ la libereco kaj trovas favoran akcepton ĉe la publika opinio. Ili volas fleksi la juran ŝtaton per liberdetruaj rimedoj kaj uzas netolereblan diskurson. Donald Trump, elektita prezidento de la plej granda demokratio, pretas reenkonduki la torturon por elradikigi terorismon, proponas politikon kontraŭ la enmigrado kaj lanĉas dekreton kontraŭ la veno de islamanoj al Usono. Kiel rememorigis Timothey Snyder [2], ankaŭ la nazia povo iam pretekstis minacon de terorismo por ĉesigi la juran ŝtaton.

Ankoraŭ pli grave, la eŭropaj ekstremdekstroj, aplaŭdante Donald Trump, en kiu ili trovis sian inspiranton, antaŭvidas similajn rimedojn. Ili kundividas komplezon al Putin. Marine Le Pen, la plej fervora, postulas malfortikigon de “la sistema politiko de la homaj rajtoj”, nek pli nek malpli! Kun ŝiaj samuloj en Nederlando, Hungario, Aŭstrio kaj Germanio ili formas reakcian kunmetaĵon, kies celo estas devojigi niajn demokratiojn de interne. Fine, kohorto da verkistaĉoj, kiuj pretekstas kontraŭi politikan ĝustecon, miskreditigas la fundamentajn rajtojn, tio estas la defendado de civilaj rajtoj kaj de la homa digno.

Aktuale la malobservoj de la homaj rajtoj estas minimumigitaj kaj ties defendantoj misfamigitaj. Necesas konsciiĝi pri urĝa rezistado. Kiel skribis René Char, “lucideco estas la vundo plej proksima al la suno”.

Leo Koneman, *fondinto kaj honorprezidanto de FIFDH [3]*
*Traduko: Richard Schneller*

**Notoj**

[1] Festival du film et forum international sur les droits humains (FIFDH): www.fifdh.org
[2] *Le Monde*, 7.3.2017
[3] *Le Temps*, 9.3.2017



# Monaj ĉifonoj (3)

## Akto II

**Sceno 1**

Juna virino sidas, prepariĝante enlitiĝi, sub iu ponto. Apude videblas restaĵoj de lignofajro. Sur ŝiaj manoj kuŝas vindita bebo.

Marta
*(kantas per soprano, akompane de mallaŭta agrabla muziko)*

Profunda nokt' arĝentas hele.
Abundaj forkoj de la voj'
Krucume sin krucigas bele,
Sur la stelar' je plia foj'.

Ja ajna vojo povas pravi.
Sed, fil'! Memori devas vi,
Ke ĉiam dignon indas havi,
Kaj konsciencon multe pli.

Nun endormiĝu, mia kara.
Vin lulu la silento mem,
Kaj perlamota trotuaro
Sekvigu vin al la dormem'.

Aer' karesas per veluro.
Tenera estas luna lum',
Malhelpas ĝin nebula muro –
De la ĉielo dormkostum'.

Aŭroro baldaŭ sin bruligos,
Kaj flagros blag' de l' nova tag',
Sed via rolo vin ne ligos
Filandre al tiu ĉi kloak'...

Marta kuŝigas sian infanon en ion similan al lulilo (fakte, ĉifonaro). Subite aperas la homo en nigro.

Homo En Nigro (persono enigma)
*(kun rideto)*

Saluton, kara!
Nokt' amara
Por vi ekŝajnu
Simpla silk'.

Mi amikemas,
Ami emas,
Kaj vin invitas
Al la cirk'...

Marta
*(surprizite)*

Al kiu cirk'
Vi nin invitas?
Ni ĉirkaŭ rand'
De l' ĉerko glitas!

Homo En Nigro (persono enigma)
*(trankvile)*

Konservu nervojn.
Tri monerojn
Mi disponigu
Per kredit'.

Se io restos,
Vi do festos.
Honesta estas
Mi, bandit'.

*(ridas)*

Mi ja festonos,
Poste donos,
Premion mian
En favor'.

Sed se forperdos
Vi feliĉon,
Ekmankos mono
Je aldon'.

Marta
*(konsternite)*

Kiun premion?
Eble, premon...

Homo En Nigro (persono enigma)

De l' vivo kremon
Indas preni,
Sed viv' sen oro
Estas magra.

Por vi prezentos
Mi ekstremon.
*(klinante sin antaŭ la infano)*
Nova sinjor',
Ekvidu realon!

Alveninte al Marta la homo en nigro donas al ŝi tri kuprajn monerojn, kiujn ŝi metas en la "lulilon".

Homo En Nigro (persono enigma)

La knabon prenos mi libere, —
Al vi ne helpos eĉ kortum',
Se la moneroj mankos vere,
Se ne videblos ajna stump'.

Almenaŭ unu vi restigu
El tiuj tri. Jen via cel'.
Riĉaĵ' kaj vivo vin instigu –
De l' ekzistado citadel'.

Marta

Ja kion perdi? Mi konsentas.
Mi grandan forton en vi sentas.
Ĉar nian fidon vi ne trompos,
Mi dankas vin, ho, nekonat'!

Sed filon mian vi ne prenu
Ja restos mono. Entrepreno,
Espero via kaj alveno
Ne estas simple klaŭnad'...

Homo En Nigro (persono enigma)
*(ridas)*

Klaŭnad', arlekenad'...
Ne gravas.

Sed akceptinte la kondiĉojn,
Vi plene pravas,
Plene pravas...

La homo en nigro magie gestas kaj aperas du nanoj vestitaj per tro grandaj orkoloraj togoj. Ili eligas Marton el ŝia rifuĝejo, helpante al ŝi. Restas sole la homo en nigro.

Homo En Nigro (persono enigma)
*(interfrotante siajn polmojn, ekfumas kaj ekparolas)*

Kiel facile!
Mi progresas.
Kaj ĉiuj ĝojas –
Ne agresas!

Kelkfoje eliginte la fumon, li ĵetas cigaredstumpon surplanken kaj forflugas supren (anticipe fiksita per nevideblaj maldikegaj fadenoj). Sonas grandioza timiga klasika muziko.

*Sekvota venontnumere.*

Espopore (Evgenij Georgiev)

# Konata neesperanta eldonejo publikigis gravan poemaron en dulingva (hispana-esperanta) versio

Kun María Ángeles Maeso mi konatiĝis en novembro 2014. La decido far la madrida esperantistaro "elkatakombigi" Esperanton tiel, ke ĝi fariĝu unu el la multaj elementoj en la kultura vivo de Madrido, sekvigis, ke oni kalkulas je ni por diversaj tiuspecaj aranĝoj. En unu el ili, mi estis invitita kiel E-verkisto konsistigi ĵurion, kune kun neesperantaj kolegoj, por verdikti pri la ŝatindeco de hispanlingvaj prozaĵoj kreitaj de ordinaraj najbaroj de la madrida kvartalo San Fermín, kadre de populara konkurso pri rakontoj. Ankaŭ Maeso, renoma hispana poetino, ĵurianis. Jam de nia konatiĝo, ŝi montris apartan intereson al Esperanto kaj al la fakto, ke mi poemas kaj prozas tiulingve. Plej afable ŝi donacis al mi ekzempleron de sia poemaro *Vamos, vemos* [Ni iras, vidas].


Apenaŭ mi revenis hejmen, mi komencis foliumi la libron. Temis pri la dua eldono de poemaro, kiu en 2003 gajnis la premion Internacia Poezi-Premio León Felipe. Ne eblis al mi forlasi ĝin. La versoj de Maeso kaptas onin. Ili ne fordonas sin unualege, sed lasas ekvidi sian spiriton kaj kreas scivolemon kaj la nepran bezonon reveni al ili. Ĉar ŝiaj versoj diras multege pli ol ili diras. Kaj havas ne pli kaj ne malpli da vortoj ol necese. Ĉio en ili estas pesita kaj pensita por estigi la envulton fare de l' o pura. Per materialo unuavide facila, sed malfacilege ordigebla kaj metebla ĝustaloken. Nenio en ili impresas artifike. Forestas ornamaĵoj, enestas pulsobatoj kaj skuoj kaj bildoj, kiuj forprenas la animon.

Baldaŭ mi havis tradukitaj kvin el la poemoj de *Ni iras, vidas*. Nelonge poste mi prezentis ilin kaj la poetikon de Maeso en *Boletín* de HEF, n-ro 408, Oktobro-Decembro 2014; *Sennaciulo*, n-ro 1-2 (1315-1316), Januaro-Februaro 2015; *Sennaciulo*, n-ro 3-4 (1317-1318), Marto-Aprilo 2015; kaj *Beletra Almanako*, n-ro 23 (Junio 2015).

Antaŭ iom pli ol unu jaro, Lidia López, estrino de la hispana eldonejo Lastura, sciigis Maeso'n pri tio, ke, ĉar la dua eldono de *Ni iras, vidas* estas baldaŭ elĉerpiĝonta, endus pensi pri la tria eldono. La poetino respondis al ŝi: "Kaj kio, se tiu tria eldono aperus en dulingva (hispana-esperanta) versio?". Lidia, gvidantino de eldonejo, kies devizo estas "la idealismo kiel eldona koncepto", entuziasme akceptis la proponon.

Diversaj cirkonstancoj prokrastis unu jaron la aperon de ĉi amata tria eldono de *Vamos, vemos / Ni iras, vidas*. Sed, fine de la pasinta februaro, ĝi povis vidi la lumon. La novaĵo plej gravas al ni esperantistoj. La fakto, ke konata neesperanta eldonejo surprenis la aperigon de dulingva (hispana-esperanta) publikaĵo, estas escepta. Same kiel la fakto, ke E-poeto estis komisiita, krom traduki la hispanan originalan tekston, verki la prologon al la tria eldono, kiu aperas apud la prologoj al la du antaŭaj eldonoj, respektive faritaj de eminentaj hispanlingvaj verkisto kaj aŭtorino. Ne gravas, ke tiu tradukinto kaj prologinto estas mi mem. Gravas nur, ke tiun homon kiel reprezentanton de la esperanta kulturo oni lokis samnivele kun la aliaj, kiuj reprezentas la hispanlingvan kulturon.

Pro ĉio ĉi, eldonejo Lastura meritas esti reciprokata de la esperantistaro per aĉeto de la libro – cetere, poezie kaj eldone plej altkvalita –, akirebla en ordinaraj hispanaj librovendejoj kaj ĉe la Lastura-retejo [*] kontraŭ po 10 €. Espereble, baldaŭ ankaŭ niaj ĉefaj libroservoj distribuos ĉi verkon. Mi kaptas la ŝancon por danki la esperantistojn, kiuj tuj post ol María Zocato distamtamis ĉi aferon en la reto, sin turnis al la Lastura-retejo kaj




aĉetis ekzemplerojn de la poemaro. Lidia López esprimis al mi siajn miron kaj kontenton pro ĉi faro. Ja se nia reago tiel pozitivos plue, Lastura certe entreprenos pliajn tiuspecajn publikigojn, kiuj donas prestiĝon al nia lingvo, al nia literaturo kaj, ĝenerale, al la E-kulturo.

Pri Lastura, mi faras mia la finan frazon diritan de Rick en la filmo *Casablanca*: "mi antaŭsentas, ke ĉi tio estas la komenco de granda amikeco".

Sanon kaj poezion!

Miguel Fernández

[*] http://lastura.es/?product=vamos-vemos-ni-iras-vidas-ed-bilingue-castellanoesperanto

# Esperanto inter la latina kaj la helena



**Saioa Escobar prelegas**

Preskaŭ ĉiuj, kiuj iam lernis la latinan memoras "rosa, rosa, rosam, rosae...", sed malmulte pli. Verŝajne la instruistoj tiam uzis la tradukagramatikan metodon, kiu fokusiĝas pri la gramatikaj paradigmoj kaj ignoras la komunikan dimension de la lingvo. Tio surprizas, ĉar ĉiuj aliaj lingvoj (inkluzive de Esperanto) kutime instruiĝas alimaniere. Fakte, malofte oni komencas tiun instruadon per la gramatiko.

Ekde kelkaj jardekoj aro de instruistoj komencis adopti la rektan aŭ naturan metodon por la instruado de la klasikaj lingvoj. Interese, tiu metodo jam estis uzata en la Renesanco kaj nur en la 19-a jarcento estis anstataŭita de la gramatika-traduka metodo. Por tiuj (idealistaj) instruistoj, la "novaj" metodoj gravas, ĉar ili alportas demokratiigon al la lernado de la latina kaj de la helena. Tiel, tiaj lingvoj iĝas pli facile (kaj agrable) lerneblaj de ĉiuj, eĉ de ne fakuloj.

La pasintajn 16an kaj 17 de marto en la historia teatro Niccolini de Florenco (Italio), amaso de tiaj instruistoj kuniĝis en la kadro de la Unua Internacia Seminario de GrecoLatinoVivo pri Didaktiko de la Klasikaj Lingvoj. La temo de la kunveno estis "De la teorio al la praktiko: ekzemploj kaj teknikoj por efika instruado en la ĉiutaga didaktika agado". Ĝi celis pensigi la instruistojn de la helena kaj la latina pri la nuntempaj instrumetodoj, precipe la tiel nomata rekta aŭ natura metodo. La teatro havas lokojn por 400 homoj kaj tute pleniĝis.

La prelegantoj parolis pri kiel nia cerbo lernas lingvojn; prezentis la agadon de naciaj asocioj; konigis la diversajn rimedojn, kiujn la instruistoj kundividas interrete; rakontis kiel konduki lecionon pere de la natura metodo; montris teknikojn, kiuj bone funkcias; analizis didaktikajn ilojn kaj instrumetodojn ekde la Renesanco ĝis nun; kaj proponis agojn por instrui la klasikajn lingvojn al lernantoj kiuj havas malfacilecon por lerni. Kelkaj el ili faris siajn prelegojn en la latina. Oni diris, ke ĉiuj spekteblos rete.

Mi mem parolis (en la itala) pri Esperanto kaj la esperanta movado. Unue, mi klarigis kio estas la internacia lingvo kaj rakontis kelkajn gravajn eventojn el historia vidpunkto (mi certe menciis SAT). Poste mi parolis pri tio, kio ŝajnis al mi pli interesa por niaj latinistaj kaj helenistaj aŭskultantoj, nome la movado hodiaŭ kaj kiel oni lernas kaj instruas Esperanton. Laŭ la opinio de la ĉeestantoj, temis pri kleriga prelego. Tamen, mi ne certas pri ĝia efiko el varbada perspektivo, kvankam je la fino kelkaj homoj alproksimiĝis al mi por demandi pliajn detalojn.

La okazaĵo havis tiel grandan sukceson, ke venontjare ĝi ripetiĝos en Napolo, en la sudo de Italio.

Saioa Escobar

## La asocio

ARILC (*Associazione per il Rinnovamento dell'Insegnamento delle Lingue Classiche* - GrecoLatinoVivo) kreiĝis en majo 2015 fare de tri instruistoj de la latina kaj la greka, kaj celas pensigi aliajn instruistojn pri la nuntempaj instrumetodoj, analizante datumojn, studojn kaj esplorojn de diversaj sciencaj kampoj.

La paĝaro GrecoLatinoVivo estas la ĉefa ilo por disvastigi tiajn verkojn. Tie oni publikigas artikolojn pri glotodidaktiko, neŭroscienco, historio de la didaktiko, ktp. Ekde ĝia apero antaŭ malpli ol unu jaro kaj duono, ĝi jam atingis 200 000 legantojn, kaj fariĝis referencpaĝaro pri didaktiko de la klasikaj lingvoj.

Tia sukceso aperigis la samnoman Studan Centron, kie la lecionoj fariĝas pere de la metodoj disvastigitaj de la Asocio. Pli ol 110 lernantoj, aĝaj inter 12 kaj 70 jarojn, jam sekvis tiujn lecionojn.

Sekvante tiujn laboron kreiĝis reto de diversaj asocioj, kiuj en Eŭropo kundividas similajn celojn, kiel *Cultura Clásica* (Hispanujo) kaj *Clenardus* (Portugalujo). Aldone, stariĝis amikaj rilatoj kun la projekto de Daniel Pettersson *Latinitium*, *Collegium Latinitatis* de Valencio, kaj aliaj instruistoj jam uzantoj de la rektaj metodoj, kiuj trovis en GrecoLatinoVivo lokon por renkontiĝi kaj libere diskuti kaj opinii.

# 8-an de marto: Internacia tago de la virino

## Enkonduko de Mireille Grosjean

**Virinoj**

Plej gravas:

– Ke knabinoj kaj virinoj povu studi laŭ siaj kapabloj same intense kaj longe kiel knaboj kaj viroj. Ni edukistoj havas en tio ŝlosilan rolon.

– Ke virinoj, se ili havas la saman diplomon, la saman dumprofesian lertigadon, la saman profesian sperton, havu la saman salajron kiel viroj.

– Ke elstaraj virinoj kiel Maya Angelou, Bertha von Suttner, Wangari Muta Maathai, Malala Yousafzai kaj multaj aliaj ekzemplodonaj virinoj, estu prezentitaj en la lernejaj programoj. Elstaraj ili estis aŭ estas, ili devas elstari. Tio ebligos pozitivan kaj kuraĝigan efikon ĉe knabinoj.

– Kaj finfine, ke viroj kaj virinoj KUNE gvidu nian mondon al egaleca disdivido de la riĉecoj kaj produktoj de la planedo. Justa pago de la produktoj endas. Tiel ĉiu homo povos vivi feliĉe kaj digne en la regiono, kie li/ŝi naskiĝis.

## Enkonduko de Verdiana Grossi [1]

### Refoja malkovro de valora teksto: Memorando pri la Paco (1915, ĝisdatigita en 1919 kaj en 2016)

Estas tekstoj, kiuj impresas nin pli ol aliaj, ĉar ili enhavas mesaĝon. Tiele la Historio povas tiel subite aperi en la Nuno. Memori aŭ forgesi? Remalkovri signifas devon komenti, kompreni kaj esplori pri rimedoj, ĉefe kiam temas pri konfliktoj. Kelkaj personoj asertos, ke tio senutilas, ke militoj ĉiam aperos kaj ke ekzistas neniu solvo por tio. Aliaj klopodos daŭre esplorante pri solvoj tra diversaj vojoj kaj ĉefe evoluigante efikan preventon de militoj.



Bertha von Suttner

En februaro 2015 la ĝeneva Lyceum-Klubo Internacia, fondita en 1912, prilaboris tiun tekston. La originalo estis verkita de 36 virinoj (el ili 13 lernantinoj de supera mezlernejo) el 7 naciecoj kaj estis subskribita en Ĝenevo la 9-an de februaro 1915. Ĝi estis la fondo- kaj kreo-akto de la Tutmonda Unio de la Virino por la Paco, kiu aktivis ĝis la fino de la dua mondmilito.

Fakte tiu teksto invitas al reviziado de la imago de la virinoj pri la milito; ĝi spronas ilin eklukti kontraŭ la psikologiaj kaŭzoj de la militoj: timo, nescio kaj monavido. Devas okazi pripensado pri valoroj kiel toleremo, solidareco, respekto de la kulturaj kaj religiaj diversecoj, respekto de iu eksterlandano, ktp. Temas pri reguloj por taŭga konduto en la ĉiutaga vivo ĉie en la mondo.



Malala Yousafzai

La fondintino de la Tutmonda Unio estis la usonanino Clara Guthry d'Arcis; ŝi elektis kiel sekretariinon la svisinon Marguerite Gobat. Tiu lasta kontribuis kiel redaktistino, feministino, pacbatalantino kaj edukistino en la lanĉo de tiuj principoj. La originala teksto estas dulingva: en la franca kaj la angla.

La versioj en la franca, germana, itala kaj angla utilis kiel bazo por la traduko al Esperanto verkita en Belgio de Sinjoro Germain Pirlot, laŭ instigo de Mireille Grosjean, prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj

Instruistoj. Tiu lingvo utilis kiel referenco por la tradukoj al la araba, la ĉina, la portugala, la nepala; al tiuj lingvoj espereble aldoniĝos pliaj lingvoj, pliaj versioj de tiu inspira teksto. Intertempe la du versioj en la franca kaj Esperanto ekflugas al la tuta mondo tra plej diversaj kanaloj kaj retoj. Tiu teksto insistas ĉefe pri la respondeco ne nur individua sed ankaŭ kolektiva vidalvide de la milito. Ĉiu persono, ĉu viro ĉu virino, nun devus koni kaj alpropriĝi al si unu aŭ plurajn punktojn de tiu dokumento kaj decidi lukti por ĝia respekto.

Tiuj 14 punktoj iru al plej multaj rondoj tra la mondo! Ili estu inspirofonto kaj kaŭzu fruktodonajn interŝanĝojn. Jen la deziro de la personoj, kiuj subskribis ĝin hieraŭ, subskribas ĝin hodiaŭ kaj subskribos ĝin morgaŭ!

VERDIANA GROSSI

# Memorando de Monda Unio de la Virino por la internacia konkordo [2]

1) Kapablu distingi la diversecon de la vidpunktoj, devigu vin trovi akordiĝterenon.

2) Anstataŭigu la malamajn pensojn, la detruemajn fortojn, per pensoj de kunsentemo kaj de justeco, per konstruigaj fortoj. Tio kun la celo neniigi la barojn en nia spirito antaŭ ol esperi neniigi la barojn en nia kunvivantaro kaj en la mondo.

3) Evitu diskonigi novaĵojn aŭ raportojn, kiuj povus estigi antaŭjuĝojn kaj malamon inter popoloj kaj nacioj.



**Wangari Muta Maathai**

4) Kontraŭ ĉiu pesimisma opinio ĉiam kaptu la okazon por starigi la memfidon de via rokfirma fido en la ebleco aboli la militon, fonton de tiom da mizeregoj.

5) Forigu la militludojn kaj lernigu al infanoj, ke la milito estas tro terura tragedio, por ke ĝi estu ludo. Ekinstruu al ili la senperfortan solvadon de konfliktoj, la repaciĝon kaj la mediaciadon.

6) Ne toleru ironiajn, malestimajn aŭ suspektemajn rimarkojn pri alilandanoj. Nepras lerni aŭskulti ilin por ekkoni ilian kulturon kaj la kontribuon, kiun ĉiu persono aŭ nacio povas doni al la komunumo.

7) Intensigu la lernadon de lingvoj; zorgu, ke la infanoj eklernu vivantajn lingvojn. Respektu la lingvojn de la minoritatoj. Vojaĝante ne forgesu, ke via lando estos taksita laŭ via konduto.

8) Memoru, ke la religia maltoleremo estigis kelkajn militojn el la plej teruraj. Per kompara studado de la religioj respektu la diversajn kredojn.

9) Evitu la stereotipojn, kiuj kontribuas por malakcepti la alian aŭ por servi proprajn interesojn, kiuj ne atentas pri la homaj elementaj bezonoj. Strebu al trankvilaj kaj justaj juĝagadoj; kuraĝigu kaj defendu la liberecon de penso kaj de opinio, kaj subtenu la sendependajn amaskomunikilojn. Zorgu, ke la antaŭjuĝoj kaj la maljustaĵoj estu forigitaj en la lernolibroj.

10) Respektu viajn apudulojn sen laŭdegi vian landon. Kiam vi vojaĝas, klopodu doni pri ĝi pozitivan bildon.

11) Ĉiam estu pretaj por kunlabori cele al la socia kaj ekonomia evoluado de la virinoj kaj aldoni en ĝin spiriton de solidareco. Luktu por la respekto de la infanaj rajtoj kaj por la protektado de infanoj.

12) Respektu la medion, la naturon kaj la bestspeciojn en malapero.

13) Kia ajn estu iun tagon via situacio, klopodu solvi akordiĝeme la malkonsentojn, kiuj povus naskiĝi ĉirkaŭ vi.

14) Per viaj pensoj kaj viaj agoj klopodu kunagi por la elradikigo de la psikologiaj kialoj de la milito: timo, nescio kaj monavido. Engaĝiĝu favore al la morala kaj materia malarmado.

*2017-03-08*

*Originalo en la franca. Esperantigis la tekston Mireille Grosjean.*

**Notoj**

[1] Historiistino pri paco, homaj rajtoj kaj historio de la virinoj, prezidanto de la Internacia Lyceum-Klubo de Ĝenevo.

[2] Parte redaktita de membroj de Lyceum Club International (Ĝenevo, 1915 kaj 1920).



**Maya Angelou**

# 89-a SAT-kongreso - Bilanco

Jen kelkaj rimarkoj rilate al la kalkulado de la kongresaj financrezultoj.

La pagitaj sumoj far la partoprenintoj enhavis:

– kongreskotizojn
– donacojn al la kongresa kaso
– kostojn de tranoktado
– kostojn de manĝaĵoj
– kostojn de ekskursoj, veturado

La kongreskotizoj (pagitaj laŭ aliĝkategorioj) kaj la donacoj al la kongresa kaso estas konsiderataj kiel enspezoj, ja la reston de la pagitaj sumoj far la kongresanoj ni elspezis por la indikitaj celoj (tranoktado, manĝoj, ekskursoj). Tiujn ni detaligas ĉi-sube.

La bilancon, detalan liston de enspezoj el kongreskotizoj kaj donacoj respektive la elspezojn por materialoj, kongresrilataj servoj kaj honorariojn por kulturaj programoj, ktp. vi trovas en la apuda tabelo.

**Tranoktado**:

Por certigi malaltajn tranoktkostojn LKK aldonis neniun kromsumon al la veraj kostoj de la hotelaj kaj feriodomaj tranoktadoj kaj pagis ĉion al la domposedantoj laŭ la nombro de pasigitaj noktoj. Do ni peris la ĉambrojn kaj prizorgis senpage la kongresanojn, sen enspezi ion ajn el tio.

**Manĝoj**:

– La enspezoj por la manĝoj estis komplete elpagitaj al la restoracio de Hotel Zum Pass, kiu prizorgis la tagkaj vespermanĝojn dum la tuta kongressemajno.

– LKK ricevis neniun kromsumon nek honorarion pro la vendado de kuponoj, deĵorado ĉe manĝoj, ktp.

**Ekskursoj**:

– La enspezoj por la ekskursoj kovris la elspezojn por luitaj busoj, enirbiletoj, muzeaj vizitoj, ĉiĉeronado, plurfoja transportado de kongresanoj al kaj de Herzberg, porkongresaj veturkostoj de volontuloj, helpantoj, organizantoj.

– Kelkaj volontulaj ŝoforoj sindone laboris por la komforto de la kongresanoj sen ricevo de laŭhora salajro aŭ honorario.

– LKK ne aldonis krome pagendan sumon pro la pli longa veturado al kaj de Sieber pro la 30-km-a kromvojo pro la fermita vojo inter Herzberg kaj Sieber, do tio estas kvazaŭa donaco al la kongresa kaso.

**Honorarioj**:

– LKK transprenis la kostojn de volontuloj, du el kiuj restis dum la tuta semajno en Sieber, bezonis tranoktadon kaj manĝadon.

– Neniun honorarion ricevis helpantoj, teknikistoj de la Kulturdomo en Sieber.

– Neniun honorarion ricevis aliaj LKK-anoj, organizantoj, nek Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, kiuj dum ĉ. unu jaro multan tempon dediĉis al administrado, korespondado, organizado de la konferenco, luado de taŭgaj tranoktejoj en feriodomoj, dumjara prizorgado de aliĝoj, aliĝkotizoj, surloka enkasigo de ne antaŭpagitaj kotizoj, ktp. Ili sen rekompenco uzis siajn privatajn aŭtojn por transportado de helpantoj, gastoj, aranĝadis liberan uzadon de terenoj por ruldomoj, tendoj, regule konsultiĝis kun la urbodomo kaj lokaj instancoj por senproblema kongresa semajno.

*OKK de la 89-a SAT-kongreso*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **BILANCO 89-A SAT-KONGRESO 16-23.07.2016 HERZBERG AM HARZ/SIEBER** | | | | |
| | **Elspezoj (EUR)** | | **Enspezoj (EUR)** | |
| 1 | Afranko (poŝtmarkoj), 09.06.2016 | 80 | 3093,5 | kongreskotizoj |
| 2 | SAT-Kongresa afiŝo de Dieter Utermöhlen, 27.06.2016 | 45 | 234,5 | donacoj |
| 3 | Afiŝkadroj, dekoraciaĵoj, Fa. Haupt, 29.06.2016 | 137 | | |
| 4 | Oficejaj materialoj de Lachnit, 27.06.2016 | 58,55 | | |
| 5 | Honorario por kongrespaĝaro: programado, grafiklaboro, teknika prizorgado | 250 | | |
| 6 | Kongressako+informmaterialoj, skribiloj, faldfolioj, broŝuroj, ktp. 100 ekz. | 500 | | |
| 7 | Kongresinsignoj (butonoj) 90 ekz. | 90 | | |
| 8 | Inkujoj por Samsung-printilo, 26.06.2016 | 163,8 | | |
| 9 | Toner HP-ColorLaserJet, 30.06.2016 | 66,59 | | |
| 10 | Honorario por verkado, redaktado, kopiado de kongreslibro, grafiklaboro | 150 | | |
| 11 | Lukostoj, purigado de kulturdomo Haus des Gastes en Sieber 08.06.2016 | 450 | | |
| 12 | Flagoj, dekoracio, teknikaĵoj por salonoj kaj kongresejo | 50 | | |
| 13 | Printado de koloraj afiŝoj ĉe CopyPrint en Herzberg 28.06.2016 | 57 | | |
| 14 | Printpapero de firmao Printus 11.07.2016 | 99,27 | | |
| 15 | Honorario nacia vespero: muzikgrupo Siebertaler | 150 | | |
| 16 | Honorario kantisto Ralph Glomp (tranoktado, manĝaĵoj, vojaĝkostoj) | 300 | | |
| 17 | Honorario Handzlik, Pilipovic (tranoktado, manĝaĵoj, vojaĝkostoj) | 650 | **3328** | |
| | | **3297,21** | **3297,21** | |
| | **Rezulto** | | **30,79** | |

# Pri referendumo por komuna kongreso de UEA kaj SAT


Unu el niaj kamaradoj, mi ne dubas ke plej bonintence, insiste regule revenas, ree, ree, kaj ree, kaj ree, per senlace daŭre ripetataj argumentoj, al la temo formulita en la titolo. Mi bedaŭras dediĉi tempon al ĉi afero, dum gravaj taskoj atendas min, sed la misprezento de ĉi temo, kiun faras nia kamarado, komprenigante, ke la Plenum-Komitato (PK) malhelpas la realigon de demokrata referendumo, kiun, laŭ li, la PK estas laŭstatute devigata kunvoki, tiel ĝenas min, ke mi preferas publike elpaŝi por defendi la pridubatan honoron de la membroj de la PK.

Unue, endas klarigi, ke la PK ne organizas kongresojn, kio estas tasko de surloka komitato. La PK laŭeble helpas, konsilas, gvidas la organizantojn, sed ne mem organizas. Pro tio, eĉ se eventuala referendumo estus realigita, kaj la rezulto estus favora al la organizado de ajna kongreso, ĉi rezulto estus senefika. Ĝenerale, por organizi kongreson ni bezonas organizantojn, kiuj proponas konkretan projekton, kiu estas submetita al kiel eble plej ĝenerala aprobo. Sekve, se kamarado deziras, ke okazu konkreta kongreso, li devas ne brue pledi por senefika referendumo, sed prilabori konkretan projekton, kaj prezenti ĝin al la ĝenerala dumkongresa kunveno aŭ al la gvidaj interkongresaj instancoj. La projekto submetiĝos al la aprobo de la ĝenerala dumkongresa kunveno. Se ĝi estas akceptita, la organizantoj povas firme plu prilabori ĝin. El la priskribita proceso endas konkludi, ke eventuala referendumo ludas nenian rolon rilate al la organizado de kongresoj.

Por pravigi sian sintenon favoran al la realigo de ĉi referendumo, nia kamarado alportas dokumenton enhavantan "liston de UEA- kaj SAT-anoj, kiuj deziras kune kongresi" [1]. Mi analizu ĉi dokumenton, per kiu nia kamarado pretendas venki la malnoblan reziston de la malicaj kontraŭdemokrataj PK-anoj, kiuj sisteme malhelpas la antaŭeniron de lia referendumo.

La dokumento konsistas el kvar sendependaj folioj. La unua estas aparte ŝoka. Temas pri germanlingva ŝablono. Iuj frazoj estas forstrekitaj. Supre aperas la manskribita titolo "Por komuna U.K. de S.A.T. kaj UEA". Meze estas listo de dek manskribitaj nomoj kun apuda numero. La aliaj tri estas listoj de nomoj kaj numeroj manskribitaj sur blanka papero. Iliakape aperas jenaj manskribitaj titoloj: "Komuna U.K. por UEA kaj por SAT", "Komuna U.K. kaj por U.E.A. kaj por S.A.T." kaj "Komuna U.K. por U.E.A kaj S.A.T". Sub ili aperas dukolumnaj listoj, kies unua linio enhavas jenajn priskribajn vortojn: "Nomo:" kaj "Kongres-n-ro" aŭ "Kongresn-ro". Plejparto el la listeroj estas nomoj kaj apudaj numeroj, foje mankas la numero, en nur kvar listeroj aperas subskribo, unu listero ripetiĝas dufoje. Ĉar mia priskribo povas aspekti fantazia, mi aldonas la esencajn partojn de la originalaj dokumentoj. Mi neniam vidis liston por peti ion ajn tiel fuŝe aranĝitan, sen enkondukaj detalaj klarigaj vortoj nek, almenaŭ, subskriboj. Normalokaze, anstataŭ analizi ĝin, mi sendus tion rekte rubujen.

Kaj jen la pinto de la absurdaĵo. Dum la SAT-kongreso en Herzberg aprobiĝis la realigo de la venonta kongreso en Gimpo, apud Seulo, tuj post la okazigo de la ĉi-tiea UEA-kongreso (kiel kutime, ni aparte zorgas pri tio, ke nia kongreso estu sinsekva al tiu de UEA, laŭeble evitante


(4)

Por Komuna U.K. de S.A.T. Kaj UEA

~~Eidgenössische Volksinitiative~~ GSoA

~~«Gegen neue Kampfflugzeuge»~~

Im Bundesblatt veröffentlicht am 10. Juni 2008; Ablauf der Sammelfrist: 10. Dezember 2009

Die unterzeichneten stimmberechtigten Schweizer Bürgerinnen und Bürger stellen hiermit, gestützt auf Art. 34,136,139 und 194 der Bundesverfassung und nach dem Bundesgesetz vom 17. Dezember 1976 über die politischen Rechte, Art. 68ff, folgendes Begehren:

*Die Übergangsbestimmungen der Bundesverfassung werden wie folgt geändert:*

**Art. 197 Ziff. 8 (neu) Übergangsbestimmung zu Art. 60 (Organisation, Ausbildung und Ausrüstung der Armee)**

[1] Der Bund beschafft bis zum 31. Dezember 2019 keine neuen Kampfflugzeuge.

[2] Als neu gelten Kampfflugzeuge, deren Beschaffung zwischen dem 1. Januar 2010 und dem 31. Dezember 2019 erfolgt.

Auf dieser Liste können nur **Stimmberechtigte unterzeichnen, die in der genannten politischen Gemeinde wohnen.** Bürgerinnen und Bürger, die das Begehren unterstützen, mögen es handschriftlich unterzeichnen. Wer bei einer Unterschriftensammlung besticht oder sich bestechen lässt oder wer das Ergebnis einer Unterschriftensammlung für eine Volksinitiative fälscht, macht sich strafbar nach Art. 281 beziehungsweise nach Art. 282 des Strafgesetzbuches.

| Kanton | PLZ | Politische Gemeinde |
|---|---|---|
| | | |

| Nr | Name, Vorname (handschriftlich und möglichst in Blockschrift) | Geburtsdatum (Tag/Monat/Jahr) | Wohnadresse (Strasse und Hausnummer) | Unterschrift (eigenhändig) | Kontrolle (leer lassen) | Schickt mir bitte weitere Infos (hier ankreuzen) |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | LABARRE 1245 | | | | | |
| 2 | [illegible] 1058. | | | | | |
| 3 | ABADA-[illegible] | 268 | | | | |
| 4 | CORREY | 682 | | | | |
| 5 | [illegible] 1292 | | | | | |
| 6 | Baumgartner Carlo | 168 | | | | |
| 7 | Baumgartner [illegible] | 169 | | | | |
| 8 | JAN SŁOWINSK | 936 | | | | |
| 9 | Mirek DZIEDZIC | 1816. | | | | |
| 10 | [illegible] RANDIN | [illegible] | | | | |

Das Initiativkomitee, bestehend aus nachstehenden Urheberinnen und Urhebern, ist berechtigt, diese Volksinitiative mit absoluter Mehrheit seiner stimmberechtigten Mitglieder vorbehaltlos zurückzuziehen:

**Angele Patrick**, Stettbachstrasse 44, 8600 Dübendorf; **Bloch Süss Monika**, Bruneggweg 4, 8002 Zürich; **Bodenmann Peter**, Englisch-Gruss-Strasse 6, 3920 Brig-Glis; **Bühlmann Cécile**, Guggistrasse 17, 6005 Luzern; **Carobbio Guscetti Marina**, Via Tamporiva, 6533 Lumino; **Daguet André**, Rathausgasse 62, 3011 Bern; **Dolivo Jean-Michel**, Avenue Vinet 14; 1004 Lausanne; **Graf Maya**, Unter der Fluh 22, 4450 Sissach; **Hug Christina**, Freiestrasse 102, 8032 Zürich; **Jobé Vivien**, Milchgasse 6, 5000 Aarau; **Lang Josef**, Dorfstrasse 15, 6300 Zug; **Leuenberger Ueli**, Rue de Lausanne 95, 1202 Genève; **Leutenegger Oberholzer Susanne**, Dürrbergstrasse 8, 4132 Muttenz; **Maury Pasquier Liliane**, Avenue de Crozet 2, 1219 Châtelaine; **Moosmann Reto**, Engehaldenstrasse 202, 3004 Bern; **Morel Gaétan**, Rue Rousseau 1, 1201 Genève; **Recordon Luc**, Lussex 1, 1008 Jouxtens-Mézery; **Regli Nina**, Beulweg 22, 8853 Lachen; **Ruch Rahel**, Nordring 14, 3013 Bern; **Savoia Sergio**, Via Mezzavilla 17, 6503 Bellinzona-Carasso; **Schnebli Tobias**, Rue de Bâle 17, 1201 Genève; **Stegmaier Michael**, Hohlstrasse 27, 8004 Zürich; **Surber Bettina**, Rosenbergstrasse 79, 9000 St. Gallen; **Trede Aline**, Sonneggweg 17, 3008 Bern; **Weibel Andreas**, Kapellenstrasse 26, 3011 Bern; **Willa Anne-Christine**, Rue Plane-ville 8, 1955 Chamoson; **Zürcher Werner**, Gantrischweg 7, 3076 Worb

Die unterzeichnete Amtsperson bescheinigt hiermit, dass obenstehende ________ (Anzahl) Unterzeichnerinnen und Unterzeichner der Volksinitiative in eidgenössischen Angelegenheiten stimmberechtigt sind und ihre politischen Rechte in der erwähnten Gemeinde ausüben.

Die zur Bescheinigung zuständige Amtsperson (eigenhändige Unterschrift und amtliche Eigenschaft):

Ort: ________ Datum: ________

Eigenhändige Unterschrift: ________ Amtliche Eigenschaft: ________

Amtsstempel

Bitte die Liste vollständig oder teilweise ausgefüllt sofort zurücksenden an das Initiativkomitee: **Gruppe für eine Schweiz ohne Armee GSoA, Postfach, 8031 Zürich**, das für die Stimmrechtsbescheinigung besorgt sein wird.

Weitere Unterschriftenlisten, Faltprospekte und Argumentarien können bestellt werden bei: Gruppe für eine Schweiz ohne Armee GSoA, Postfach, 8031 Zürich, via Website www.gsoa.ch oder telefonisch unter 044 273 01 00.

koincidon kun aliaj gravaj esperantaj eventoj, aparte la IJK kaj la ILEI-konferenco). Nia kamarado entuziasme reagis, manifestante al gapanta publiko, ke lia celata komuna kongreso finfine realiĝos. Pro tio ni konkludas, ke la signifo, kiun donas al la vorto "komuna" nia pledanto por "komuna kongreso", estas malsama ol tiu komprenata de la komunaj lingvo-uzantoj.

Resume kaj konklude: malpli da bojado kaj pli da vojado.

Pedro Sanz
*Majo 2017*

[1] Letero al la PK datita la 18-an de septembro 2015.

# Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2016 ĝis Majo 2017

### Plenum-Komitato

La PK kunvenis la 18an de junio, la 16an de julio en Sieber apud Hercbergo (kun anoj de ĜK-aro), la 24an de septembro, la 5an de novembro, la 3an de decembro 2016, la 14an de januaro, la 24an de februaro, la 1an de aprilo, la 29an de aprilo kaj la 20an de majo 2017. La kunvenoj nun sisteme okazas per komputila tujmesaĝado, kaj neĉeestintoj komentas la traktitajn punktojn per retmesaĝoj. La PK akceptas kiel konstantajn gastojn k-dojn Amparado Cisnero kaj Gijermo Fians. Ĝi plie sisteme pridiskutas la unuopajn komentojn, kiujn Ĝeneralaj Konsilantoj sendas reage al la kunvenprotokoloj.

### Administrado

La membrosliparo estas mastrumata de Bruno Henry, lige kun la kasista laboro. Franjo Martin ricevas la leterojn rilataj al financaj aferoj, kaj zorgas pri subskribo de la ĉekoj el Francio. Guy Cavalier zorgas pri leteroj alvenintaj en Parizo kaj pri reekspedo de Sennaciulo. Diana Riŝar kribras la mesaĝojn alvenantajn ĉe la oficiala retadreso de SAT (kontakto@satesperanto.org). Tereza Sabatier, eksa PK-anino, plu helpas en rilatoj kun la impostoficejo.

### Sidejo

La sidejo de SAT utilas kiel stokejo por nuntempe vendataj libroj kaj freŝdataj gazetaj kromekzempleroj. Ĝi samtempe estas konsultejo pri administraj dokumentoj, malnovaj eldonoj kaj historiaj dokumentoj. La ĉeesto ekde septembro 2016 de Gijermo Fians, kiu kadre de siaj antropologiaj doktoriĝ-studoj laboris kiel volontulo en Parizo, ebligis grandskalan reordigon kaj refreŝigon de la SAT-sidejo. Unu el ĝiaj ĉambroj estis entute refarbita. Vidu fotojn en p. 36.

### Adresaro

La papera adresaro estas enpaĝigita de Ĝilo Perez, surbaze de ĝisdatigita membrosliparo kaj de administraj informoj, pri kies kompilado zorgas Diana Riŝar kaj Vinko Markovo. Vito Markovo plie sisteme kolektis kaj kompilis esperantig-proponojn pri loĝlokoj.

### Rilatoj kun LEA-oj kaj SAT-rondoj

Aperas regule en Sennaciulo informoj pri aktivaĵoj kadre de SATeH kaj SLEA. Ankaŭ SAT-anoj el Japanio informas pri siaj agadoj pere de Sennaciulo. La SAT-kongreso en Seulo estis prezentita okaze de la SAT-Amikara kongreso apud Nanto, en aprilo.

### Membraro

Je la 18a de majo la membraro de SAT konsistas el 541 membroj, el kiuj 289 repagis sian kotizon por 2017, kaj 125 pliaj pagis minimume por 2016. 161 malfruantoj, kiuj ne reagis al la lasta revok-letero, ricevis nur retan version de la numero 3-4 de Sennaciulo 2017, kaj estis avertitaj, ke kaze de daŭra nereago ne estos senditaj al ili la postaj numeroj.

*La ĉi-kuna tabelo resumas la nunan strukturon de la membraro.*

Dum la jaro mortis 6 kamaradoj kaj aliĝis 35 novuloj (de 36063 ĝis 36098). La novuloj ricevas, aldone al numeroj de Sennaciulo pri la kuranta jaro kaj adresaro, 8-paĝan bonvenig-tekston, kiu klarigas la diversajn aspektojn de la vivo de SAT, por helpi ilin trovi rapide sian lokon en SAT.

### Dissendolistoj de SAT

La Iperrondo de SAT, publika diskutejo malfermita al ne-SAT-anoj, estas daŭre mastrumata de Petro Levi kaj Dieter Rooke. En ĝi membras 92 homoj. Tri malsamaj temoj estis diskutitaj dum la jaro. La anoncita fermo de la retejo planita por januaro 2017 fine ankoraŭ ne okazis, sekve al klopodoj de novkreita asocio de uzantoj de Ipernitio, kiu klopodas igi la servon daŭre havebla, kaj organizis grandskalan monkolektadon tiucele.

En SAT-diskuto, la ĉefa interna interŝangejo de SAT, estas registritaj 149 retadresoj. La mesaĝonombro variis inter 15 kaj 266 monate. Mastrumas la liston Bruno Henry, Ĝemil Kessous kaj Vinko Markovo.

### Retejo

La retejo de SAT enhavis 2475 artikolojn je la 25-a de junio. La meza vizitantonombro laŭtage estas iom super 4000. La lastjare observebla tendenco al rapida kresko de la vizitantonombro do konfirmiĝas. Notinde, plej multaj vizitoj venas el korea kaj ĉina serĉmotoro. Ankaŭ ofte el vikipedio, el la esperanta versio, aŭ el la nacilingvaj paĝoj pri SAT en la angla, franca, rusa kaj hispana lingvo unuavice. La plej grandan parton el novaj artikoloj (iom malpli ol 100) ŝuldiĝas al la laboro de Hans-Georg Kaiser (Cez) en la SAT-Kulturpaĝoj. Plie, la retejon nutris Vito Markovo (kongresinformoj, kaj diverslingvaj artikoltradukoj), Dominiko Simeone (paĝoj de liberpensula frakcio) Pedro Sanz (ĝisdatigo de administraj informoj) kaj Vinko Markovo (temaro de Sennaciulo). La teĥnika prizorgado de la retejo (savkopioj, servilo kaj ĝenerala aspekto) daŭre estas plenumata de Frederiko Scibor. Pli ol 700 artikoloj, plejparte nedefinitivaj versioj el artikoloj aperintaj en Sennaciulo, daŭre atendas finpoluradon kaj publikigon en la interna spaco de la retejo, pro manko de homfortoj pri tiu ĉi tasko. La interna spaco de la SAT-retejo daŭre uziĝas por la redaktado de Sennaciulo.

### Perantoj

SAT havas perantojn en 27 lokoj, kaj plie havas izolitajn membrojn en 28 landoj senperantaj, pri kiuj akceptis zorgi Veronik Girard kaj Anne-Marie Leprévost.

Reordiĝis la rilatoj kun perantoj en Bulgario kaj Japanio. Nova peranto proponiĝis por Serbio, kaj por Katalunlingvio. Dum la jaro malaperis perantoj el Danio kaj Usono. La peranto por Germanio, Dominik Schramm, fakte nun daŭre loĝas en Eŭskio, plu pretas plenumi la taskon en 2017, sed sekve bezonus esti anstataŭita en 2018.

### Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo

La enpaĝigon de Sennaciulo prizorgas Nicolas Raymond. La

redaktoskipan laboron kunordigas Pedro Sanz kaj Vinko Markovo. Ceteraj nunaj redaktantoj estas Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina Opulskiene, Kani, Rikardo Schneller, Serge Sire kaj Franciska Toubale. Rob Moerbeek ankaŭ kontribuis dum la jaro.

Sennacieca Revuo estas enpaĝigita de Ĝilo Perez, kunlabore kun la redaktoskipo de Sennaciulo. La redaktadon por la numero 2016-2017 kunordigis Vinko Markovo. Diana Riŝar pretas kunrespondeci ekde la venonta numero, kaj jam fakte helpis en finpretigo de la ĉi-jara duobla numero.

Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo havas 34 abonantojn, el kiuj unu ricevas nur la perretan version, same kiel okazas por 27 SAT-anoj. Ekde la numero 3-4/2017 Sennaciulo estas sisteme rete sendita al ĉiuj SAT-anoj, kies retadreso troviĝas en la membrosliparo. Ekde la numero 5-6/2016, Sennaciulo aperas tutkolore.

### Eldona Fako Kooperativa

Leĝaj respondeculoj de la kooperativo aldone al Veroniko Girard, Flora Markov kaj Vinko Markovo. Guy Martin plie helpis en ordigo de la kontad-dokumentoj kaj preparo de financa bilanco. La dissendolisto "SAT-EFK", kiu uziĝas por diskuti eldonprojektojn, enhavas 40 membrojn.

Prezento de la dokument-filmo "Esperanto" de Dominiko Gaŭtiero estas planita dum la internacia festivalo en Bjelovar (Kroatio) dum somero 2017. Ĝia vendoprezo malaltiĝis al 9€ post diskuto dum la 89-a SAT-Kongreso.

"La silento de l'armiloj", tradukita romano de Bernard Clavel, preskaŭ pretas, kaj nur bezonas finpretigon de la kovrilpaĝo. Materialo por la libro pri unua mondmilito estas finkolektita. La libro nun estas kompostata.

Aliaj pridiskutataj projektoj dum la jaro estis libro pri tradukarto de la nuna franc-portugala tradukisto Carlos Batista, traduko de "Programo de Anarkio" (1906) de Eriko Malatesta, kaj broŝuro pri dumviva salajro de nuntempa franca ekonomikisto Bernard Friot.

### Poresperanta Fako

La dissendolisto de la poresperanta fako ĉefe utilas por kunordigi la klopodojn pri traduko de nacilingvaj kongresdokumentoj. Deklaracio de la 89-a SAT-Kongreso estis tradukita al la angla, germana, franca, korea, pola kaj portugala lingvo. Plie la kongresa gaztartikolo estis tradukita la la germana, franca, hispana kaj portugala lingvo. Notinde, ke tiu ĉi kongresartikolo estis unu el la plej vizitataj artikoloj de la retejo.

### Venontaj kongresoj

La 91a SAT-kongreso estas planita en Kragujevac, Serbio, inter la 5a kaj 12a de aŭgusto 2018. Por la postaj jaroj, estis iam diskutitaj eblecoj en Svedio (Lesjofors) aŭ Tunizio, sed momente estas nenia konkreta engaĝiĝo tiurilate.

**Situacio membroj/abonantoj SAT 2017/05/18**

| | Malfruantoj | | |
|---|---|---|---|
| | Pagis antaŭ 2015 | Pagis 2016 | Pagis 2017 |
| | Revokletero | | |
| ARGENTINO | 3 | 2 | 0 |
| AŬSTRALIO | 0 | 0 | 8 |
| AŬSTRIO | 0 | 2 | 1 |
| BARATO | 0 | 0 | 1 |
| BELGIO | 3 | 0 | 8 |
| BOSNIO-HERCEGOVINO | 0 | 0 | 6 |
| BRAZILO | 5 | 1 | 4 |
| BRITIO | 8 | 2 | 7 |
| BULGARIO | 6 | 10 | 0 |
| BURKINO | 1 | 0 | 0 |
| ĈEĤIO | 0 | 0 | 4 |
| ĈINIO | 0 | 0 | 2 |
| DANIO | 1 | 0 | 3 |
| FINNLANDO | 0 | 0 | 2 |
| FRANCIO | 49 | 36 | 77 |
| GANAO | 1 | 0 | 0 |
| GERMANIO | 2 | 9 | 17 |
| GREKIO | 1 | 0 | 0 |
| HAITIO | 1 | 0 | 0 |
| HISPANIO | 2 | 8 | 23 |
| HUNGARIO | 0 | 1 | 2 |
| ISLANDO | 0 | 0 | 4 |
| ITALIO | 1 | 3 | 12 |
| IZRAELIO | 0 | 0 | 2 |
| JAPANIO | 17 | 7 | 22 |
| KANADO | 1 | 0 | 1 |
| KOREIO | 2 | 2 | 14 |
| KROATIO | 7 | 0 | 3 |
| KUBO | 4 | 2 | 1 |
| LATVIO | 0 | 0 | 1 |
| LITOVIO | 0 | 0 | 3 |
| LUKSEMBURGIO | 0 | 0 | 2 |
| MADAGASKARO | 0 | 0 | 9 |
| MALIO | 0 | 1 | 0 |
| MEKSIKIO | 2 | 0 | 0 |
| MONGOLIO | 1 | 0 | 0 |
| NEDERLANDO | 1 | 2 | 9 |
| NEPALO | 0 | 4 | 2 |
| NORVEGIO | 0 | 0 | 2 |
| POLLANDO | 4 | 1 | 3 |
| PORTUGALIO | 0 | 0 | 5 |
| RUMANIO | 1 | 1 | 0 |
| RUSIO | 11 | 2 | 2 |
| SALVADORO | 1 | 0 | 0 |
| SERBIO | 9 | 1 | 10 |
| SLOVAKIO | 0 | 0 | 1 |
| SLOVENIO | 0 | 1 | 0 |
| SVEDIO | 2 | 8 | 2 |
| SVISIO | 0 | 7 | 0 |
| TAJVANO | 0 | 0 | 2 |
| TANZANIO | 1 | 0 | 0 |
| TOGOLANDO | 0 | 5 | 2 |
| TURKIO | 0 | 1 | 0 |
| UKRAINIO | 1 | 0 | 4 |
| USONO | 12 | 6 | 6 |
| **SUMOJ** | **161** | **125** | **289** |
| **TUTA SUMO** | | | **575** |
| **Abonantoj** | | | **-34** |
| **Membroj** | | | **541** |

# BILANCO je la 31a de decembro 2016

| Aktivo | 2016 | | | 2015 |
|---|---|---|---|---|
| | bruta | amort./prov. | neta | |
| **Asocia sidejo** | 15 065,29 | 5 737,98 | 9 327,31 | 10 301,97 |
| **Mebloj, komputiloj** | 7 233,86 | 7 233,86 | 0,00 | 0,00 |
| **Sociaj kapitaleroj** | 166,22 | | 166,22 | 166,22 |
| **Nemovigeblaĵoj** | 22 465,37 | 12 971,84 | 9 493,53 | 10 468,19 |
| **Librostoko** | 7 411,72 | | 7 411,72 | 7 917,32 |
| **Ricevotaj kotizoj** | | | 7 026,88 | 10 364,00 |
| **Kreancoj avance Seulo** | 2 282,00 | | 2 282,00 | 0,00 |
| **Poŝta banko** | | | 23 687,42 | 18 691,27 |
| **La NEF** | | | 24 499,16 | 24 311,25 |
| **UEA** | | | 1 895,12 | 2 472,10 |
| **Paypal** | | | 0,00 | 0,00 |
| **Disponebla mono** | | | 50 081,70 | 45 474,62 |
| **Entute** | | | **76 295,83** | **74 224,13** |

| Pasivo | 2016 | 2015 |
|---|---|---|
| | | |
| **Asocia Kapitalo** | 26 132,51 | 21 021,23 |
| **Rezulto** | 3 944,52 | 5 111,28 |
| **Longdaŭraj pruntoj** | 21 330,00 | 22 734,00 |
| **Solidarkaso** | 2 880,52 | 3 722,32 |
| **Helpofonduso kongresontoj** | 10 800,57 | 10 707,57 |
| **Fonduso PIV** | 2 000,00 | 0,00 |
| **Pagotaj fakturoj** | 0,00 | 0,00 |
| **Kotizoj antaŭpagitaj** | 1 198,94 | 2 478,08 |
| **Deponoj (fakoj, membroj)** | 6 543,65 | 8 449,65 |
| **Ŝarĝoj antaŭkalkulitaj** | 1 465,12 | 0,00 |
| | | |
| | | |
| **Entute** | **76 295,83** | **74 224,13** |

## KLARIGOJ

**EN LA KOLUMNO "AKTIVO":**
**Ricevotaj kotizoj**: Japanio pagis ŝuldatajn kotizojn (5100 EUR) en 2016, kaj la finan parton (7026,88 EUR) en 2017.
**Kreancoj**: Ni antaŭdonis 3000 EUR al la OKK en Seulo por la kongreso 2017, el kiuj restas 2282 EUR fine de 2016.
**EN LA KOLUMNO "PASIVO":**
**Helpofonduso kongresontoj kaj Solidarkaso**: Membro-donacoj por helpi la kamaradojn kiuj estas nepagipovaj.
**Longdaŭraj pruntoj**: Dumvivaj membroj.
**Fonduso PIV**: Ni antaŭvidas 2000 EUR por reeldoni PIV.
**Ŝarĝoj antaŭkalkulitaj**: Impostoj kaj taksoj 1050 EUR + administraciaj ŝarĝoj.
Ni intencas kontroligi la librotenadon, kun fakturoj kaj kvitancoj, antaŭ la kongreso.

HENRY Bruno - SAT-Kasisto
*En Changsha, Ĉinio 2017/05/20*

# SPEZOKONTO – Jaro 2016

| Kostoj | 2 016 | 2 015 | Rimedoj | 2 016 | 2 015 |
|---|---|---|---|---|---|
| Variado de stoko | 505,60 | 0,00 | Abonoj | 5 644,50 | 9 180,41 |
| Elektro | 109,85 | 130,08 | Vendo de varoj | 1 788,29 | 91,62 |
| Aĉeto de varo | 63,29 | 0,00 | Aliĝoj | 7 829,24 | 8 532,43 |
| Lupreno de stokejo | 1 570,48 | 0,00 | Donaco Solidarkaso | 1 115,17 | 1 714,66 |
| Sidejaj elspezoj | 1 484,47 | 1 636,13 | Donaco Kongres-helpofonduso | 1 385,39 | 2 468,46 |
| Asekuro | 208,17 | 207,17 | Malfruaj kotizoj | 1 363,86 | 2 617,68 |
| Presokosto | 4 271,25 | 6 931,35 | Interezoj | 187,91 | 525,27 |
| Sendokostoj de revuoj | 2 997,23 | 4 465,02 | | | |
| Vojaĝoj | 500,00 | 0,00 | | | |
| Poŝto - telefono | 308,15 | 562,61 | | | |
| Honorarioj | 118,80 | 370,80 | | | |
| Financaĵoj | 143,89 | 228,78 | | | |
| Impostoj kaj taksoj | 1 187,00 | 72,00 | | | |
| Uzado Solidarkaso | 369,00 | 308,00 | | | |
| Uzado Kongres-helpofonduso | 0,00 | 409,50 | | | |
| Esceptaj elspezoj (Bulgario) | 558,00 | 177,28 | | | |
| Amortizoj | 974,66 | 1 054,91 | | | |
| Provizo al Solidarkaso | 0,00 | 1 406,66 | | | |
| Provizo al Helpofonduso | 0,00 | 2 058,96 | | | |
| Rezulto (pozitiva) | 3 944,52 | 5 111,28 | Rezulto (negativa) | | |
| Entute | 19 314,36 | 25 130,53 | Entute | 19 314,36 | 25 130,53 |

## KLARIGOJ

**EN LA KOLUMNO "KOSTOJ":**

**La rezulto estas pozitiva**: 3944,52 EUR.

**Variado de stoko**: Ni vendis 40 PIV en 2016.

**Perdo de kotizo Bulgario**: De la jaro 2012 ĝis 2015 ni ne ricevis kotizojn (558 EUR) de bulgaroj. En 2016 ni ricevis 54 EUR de kotizoj (jaro 2016).

**Presokosto kaj sendokostoj de la revuoj**: Ni eldonis 5600 ekzemplerojn en 2015, kaj 3500 en 2016.

**Lupreno de stokejo**: Ni pagis la jarojn 2015 kaj 2016 kune en 2016.

**Impostoj kaj taksoj**: Nova kasisto transprenis la taskon en aprilo 2015 kaj, plie, okazis problemo pro elektronika transsendo de la donitaĵoj al la fisko. Ni pagis monpunon 1050 EUR pro malfrua deklaro.

**Uzado de la Kongres-helpofonduso**: Monoj deponitaj de membroj, kiu ne estis uzita en 2016.

**Provizo al Solidarkaso kaj Helpofonduso**: Ni uzis parton de 2015 por provizo al PIV (2000 EUR).

**EN LA KOLUMNO "RIMEDOJ":**

Vendo de varoj: Ni vendis 40 PIV en 2016.

**Aliĝoj/Kotizoj/Abonoj**: La enkasigo de kotizoj malpliiĝis ĉar tro multe da membroj malfruas aŭ ne pagas la kotizojn. En marto 2017 ni sendis 205 revokleterojn al la malfruantoj. Ĝis majo nur 53 reagoj, kaj 13 ĉesas membri.

**Donaco al la Kongres-helpofonduso**: Enhavas ĉefe la profiton de la SAT-Kongreso en Nitro + aŭkcion.

**Interezoj**: En 2015 la cifero enhavas la interezojn 2014.

# Raporteto de la kontokontrolistoj

En Parizo (SAT-ejo), la 11an de julio 2017

Ni,

PEYROUTY Hubert / BLANŜEZO Ĵomo / MOREIRA FIANS Guilherme

kontrolis la kontojn de SAT de la jaro 2016. Ni konstatis ke la tenado estas prezentita laŭ la franca leĝo kaj ne konstatis nenormalaĵojn laŭ la dokumentoj prezentitaj.

Nur nu ne povis kontroli la kontojn de la SAT-ejo mem post la monato de junio 2016, ĉar la informoj pri la konto ĉe la "cabinet MASSON" (kunproprietuloj) mankis.



# Perantoj

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete : fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1 , BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916
Rete : cglady@arcadis.be
Bankkonto : 750-6373051-18
IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Ivica Horvat
Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino
rete : ivica.h@hs-hkb.ba
**Brazilo** – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete : esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa) : +557 7988011780
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel. : +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete : ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉeĥio** –Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel. : +420.737230231, rete : stiburek.v@seznam.cz
IBAN : CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT : FIOBCZPPXXX
**Ĉinio** – BRUNO GUY CLAUDE HENRY
rete : esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto N°6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC : BKCHCNBJ970
BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong Road (M) CHANGSHA - HUNAN -ĈINIO
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete : barthelemy.maurau@free.fr
Bankkonto : 1733310 N 020
IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070
BIC : PSSTFRPPPAR
**Germanio** – Dominik Schramm
Möhringer Straße 43, DE-70199 Stuttgart, GERMANIO
rete : dominik.schramm@gmx.net

**Hispanio** – Pedro Maria Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete : pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – Tóth Zsolt
Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario
Tel : +36-20-5188919 , rete : zstoth75@gmail.com
Bankkonto : 11773377-00000354
IBAN : HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000
BIC : OTPVHUHB
**Italio** – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) , Italio
rete : carlo.bourlot@gmail.com
Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993
Poŝtkonto : n-ro 43976158
Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,
Kodo BIC : BPPIIRRXXX
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete : b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete : sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto : 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio**
Viktoro Solé – KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: v.sole@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu
KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do
rete : paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
Otok Brac, HR-21414 Gorni Humac, Kroatio
Tel : +385.21.647.059, Poŝtel : +385.098.182.79.07
rete : ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Poŝtkonto : 3200129804 Splitska banka
IBAN : HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC : SOGEHR22
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel : +37068736457, rete : grazopul@yahoo.com
Bankkonto : LT347300010001720030
BIC/SWIFT kodo : HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete : llrespr@libero.it
IBAN : MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
**Portugalio** – Manuel Luis Pedrosa Alves
Estrada Principal, 79, Morelinho, PT-2710 Sintra, Portugalio
rete : morelinho_sintra@hotmail.com
**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete : nikolao@orc.ru
**Serbio**
Miomirka Kovačević, Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete : ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto : Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN : SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC : NDEASESS
**Svisio** – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
**Tajvano** – CHO Chaoming
12F2, No. 41 , Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung
rete : cmcho@so-net.net.tw
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete : classs@bigmir.net, telefone : 380 67 99 470 03
**Aliaj landoj**
SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso) : kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj) : financoj@satesperanto.org
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto : 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC : PSSTFRPPPAR
eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA : satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal : financoj@satesperanto.org

# Kotizoj 2017

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 24 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstralio | 52 € | Kroatio | 16 € (120 HRK) |
| Aŭstrio | 52 € | Kubo | 4 € |
| Barato | 8 € | Latvio | 16 € |
| Belgio | 52 € | Litovio | 16 € |
| Bosnio-Herc. | 12 € | Luksemburgio | 52 € |
| Brazilo | 20 € | Madagaskaro | 4 € |
| Britio | 52 € (40 GBP) | Makedonio | 12 € |
| Bulgario | 12 € | Malio | 4 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Mongolio | 8 € |
| Ĉinio | 8 € (56 CNY) | Meksiko | 16 € |
| Danio | 52 € | Nederlando | 52 € |
| Estonio | 16 € | Norvegio | 52 € |
| Finnlando | 52 € | Pollando | 16 € |
| Francio | 52 € | Portugalio | 28 € |
| Germanio | 52 € | Rumanio | 12 € |
| Grekio | 8 € | Rusio | 16 € |
| Haitio | 4 € | Serbio | 12 € |
| Hispanio | 40 € | Slovakio | 16 € |
| Hungario | 16 € | Slovenio | 16 € |
| Irano | 12 € | Svedio | 52 € |
| Islando | 36 € | Svisio | 52 € (64 CHF) |
| Israelo | 36 € | Tajvano | 32 € (1160 TWD) |
| Italio | 48 € | Turkio | 16 € (52 TRY) |
| Japanio | 52 € (6960 JPY) | Ukrainio | 8 € |
| Kanado | 52 € (80 CAD) | Usono | 52 € (64 USD) |
| Kolombio | 12 € | | |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**


*Sennaciulo*
Oficiala organo de SAT

**Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Sekretario:* Diana Riŝar
*Kasisto:* Bruno Henry
*Membroj:* Guy Cavalier, Franjo Martin, Pedro Sanz, Dominiko Simeone

**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale.
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 39 €
Autres pays/*aliaj landoj:* peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 20 G 86567


> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.

> **Nura abono al Sennaciulo : 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Help- kaj grupmembroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

# Donacintoj

**Solidarkaso**
CAVALIER Guy — 26 EUR
CARLOS-ARTIMES Carlos — 12 EUR
HARJU Antero — 18 EUR
FARKAS Laszlo — 10 EUR
GRUP Gérald — 8 EUR
PHELAN Gerry — 6 EUR
GROSJEAN Mireille — 3 CHF

# Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 2016-2017

**1- Rememorigo de la funkcio de Ĝenerala Konsilantaro**

"La Ĝ.K.-aro helpas al P.K. per siaj informoj kaj konsiloj. Ĝi plie observas kaj kontrolas la agadon de la P.K. – Se la Ĝ.K.-aro rimarkas, ke tiu agado ne estas honesta kaj laŭstatuta, ĝi rajtas konigi siajn konstatojn al la tuta membraro per la presorgano. La Ĝ.K.-aro prezentas raporton antaŭ ĉiu Kongreso. Ĝi rajtas demandi al la P.K. pri ĉiuj aferoj kaj postuli respondon.

**2- Membroj de Ĝenerala Konsilantaro**

**La membroj de ĜK-aro de la kategorio A**, t.e. la membroj por geografiaj sektoroj elektatis rekte per referendumo de la tuta anaro kun membroj de la PK. Ili elektatas por la periodo 2015-2018.
Renata Chassard-Caubel por aĝena SAT-rondo
Koffi Gbeglo por lomea-aneha SAT-rondo
Nikolao Gudskov por Moskvo
Hyunsoo Jung, alinome Paz, por Seula SAT-rondo
**La membrojn de ĜK-aro de kategorio B**, t.e. membrojn de Konflikt-Komisiono elektas Kongreso,
Vincento Charlot
Petro Levi
José-Maria Salguero
**Membro de ĜK-aro de kategorio C**, t.e. reprezentanto de membraro el urbo, kie sidas la PK
Vincent Charlot
**Membrojn de ĜK-aro de kategorio Ĉ**, t.e. reprezentantoj de LEA-oj konvencie ligitaj al SAT proponas koncerna LEA,
Carlo Bourlot por ILEA
vakas por SATEB
Gary Mickle por LEA/G
Inga Johanson por SLEA
José Maria Salguero, alinome Kani, por SATeH,
Serĝo Sir' por SAT-Amikaro
vakas por SATeJ.
**Membrojn de ĜK-aro de kategorio D**, t.e. membroj de fakoj funkciantaj ekster sideja urbo
Robin' Beto por Poresperanta Fako
vakas por Eldona Fako Kooperativa

**3- Aktivaĵoj de Ĝenerala Konsilantaro**

Rimarkoj de ĜK-oj estis sisteme komentitaj dum posta kunveno de la PK. La sendo de la protokoloj okazis akurate.

**4- Konfliktkomisiono**

Neniu plendo atingis nian triopon de la lasta kongreso.

Vincento CHARLOT
*Sekretario de la Ĝenerala Konsilantaro de SAT*

# Novaj aliĝoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| 36094 | BOLOGNESI Romano | IT 40139 - BOLOGNA | Italio |
| 36095 | GNANCADJA Bernard | BJ - LOKOSSA MONO | Benino |
| 36096 | PARK Suh-hyun | KR 931-103 - SEOUL | Koreio |
| 36097 | YU Pilgeun | KR 07739 - SEOUL | Koreio |
| 36098 | ĜU Ĝungsik | KR 50-130 - GEOCHANG-EUP | Koreio |
| 36099 | DIEZ, Luis | ES 28911 - LEGANÉS | Hispanio |

## Nekrologo

## NADUDVARI Otto



Nia malnova (SAT-matrikulo 25656) kamarado Otto naskiĝis en 1929. Laŭ la filino Rita li forpasis en novembro 2016. Esperanton Julio Baghy instruis al li. Otto aliĝis al SAT en 1947. Dank' al la "Amikeca Reto" li gastigis min en sia hejmo apud la lago Balatono. Otto rakontis al mi pri kiam li partoprenis la Hungaran Revolucion de 1956 en Budapeŝto, kiu estis popola revolucio kontraŭ sovetia influo. Li estis kapitano en la hungara popola armeo. Oni kaptis lin kaj decidis mortpafi lin. Feliĉe tio ne okazis. Poste li perdis sian postenon en la armeo kaj laboris kiel tramisto.

HENRY Bruno (34987)

# Malfermitaj pordoj en reordigita SAT-sidejo







Kuntrinkantoj post franclingvaj klarigoj pri SAT al najbaroj kaj komencanto, la unuan de julio





Prelego de Xavi Alcade pri La memoro de la nia movado klarigata de ĝiaj ĉefroluloj, la 6an de julio